**Speciala eldono por la Monda Socia Forumo 2007, en Najrobo (Kenjo)**

Esperanto: lingvo de evoluo (R. Corsetti, p. 7) – Revosolvo por la Proksim-Oriento (G. Corm, p. 5)
Aniĝu ĉe la Amikoj de la DIPLO (p. 7) – Skriba gazetaro en struktura krizo (I. Ramonet, p. 2)

# LE MONDE diplomatique en Esperanto

22-a de Januaro 2007 – Eldono de *Le Monde diplomatique en Esperanto* - http://eo.mondediplo.com - kaj de *Monda Asembleo Socia (MAS)* - http://mas-eo.org

## MONDA SOCIA FORUMO

### Kia alimondismo?

**de Samir Amin** *(Prezidanto de la Monda Forumo de Alternativoj)*

LA NUNA FORMO de tutmondiĝo havas malmulton por proponi al la popoloj de la Sudo: profitebla por malplimulto da homoj, ĝi postulas, kiel kontraŭparton, la malriĉigon de la aliaj, aparte de la kamparaj socioj, kiuj konsistigas proksimume la duonon de la homaro. Je tutmonda nivelo, la profit-logiko sekvigas la kreskantan detruon de la naturaj bazoj por reproduktiĝo de la vivo sur la planedo. Kun la privatigo de la publikaj servoj, ĝi reduktas ankaŭ la sociajn rajtojn de la popolaj klasoj. Vide al tiu realo, la kapitalismo, kies tutmondiĝo estas la nuntempa esprimiĝo, devus esti konsiderata kiel eksteruza sistemo.

Tamen, la plimulto de la movadoj, kiuj batalas kontraŭ ĝiaj efikoj, ĉiam malpli kontestas ĝiajn fundamentajn principojn, kio hipotekas ilian kapablon proponi alternativajn solvojn, tamen necesajn kaj eblajn. Tiuj devus kunigi, kaj ne disigi, la demokratiigon de la mastrumado de ĉiuj aspektoj de la vivo – politika, ekonomia, socia, ekologia kaj familia – kun progresoj kiujn profitu ĉiuj civitanoj, komencante per la plej senhavaj. Tiuj antataŭaj solvoj devus ankaŭ enteni la respekton al la suverenco de la ŝtatoj, de la nacioj kaj de la popoloj, kaj la konstruadon de multcentra internacia sistemo por substitui al la fort-rilatoj la devon intertrakti.

## EN TIU ĈI NUMERO

**1-a paĝo:** Samir Amin: Kia alimondismo?
La naŭ centraj temoj de tiu ĉi MSF 2007
**2-a paĝo:** La Esperanto-Organizoj rekte aŭ malrekte partoprenantaj en la MSF 2007; Kolofono; Ignacio Ramonet: Minacoj por la informado;
**3-a paĝo:** Manifesto de Karakaso; Emir Sader: Grava aganto de regiona integriĝo;
**4-a paĝo:** Akiva Eldar: La promocio de s-ro Avigdor Lieberman en la registaron – Kiel Israelo alvenis al tio; Georges Corm: „Disidenta" revo pri ĝenerala regulado;
**5-a paĝo:** Alain Bihr: Ĉe la originoj de kapitalismo – La fundamenta eraro de Adamo Smith
**6-a paĝo:** Eric Klinenberg: For la polistirenajn glasojn!; Samo:
**7-a paĝo:** Alvoko de la Redaktejo: La Amikoj de la DIPLO; Prezentas sin sur la MSF 2007 la Esperanta Civito kaj la Universala Esperanto-Asocio (UEA)
**8-a paĝo:** Fina deklaro de la kontraŭpinto (Latinameriko-Karibio-Eŭropa Unio) en Vieno
**9-a paĝo:** A. Pérez Esquivel pri la ŝuldoproblemo
**10-a paĝo:** Cionismo, palestinanoj kaj la dunacia ŝtato (komento pri opinisondaĵo)
Maurice Lemoine: La dua industrio de Ekvadoro;
Nadine Gordimer: La homaro kiel reflekto de la justeco *(komento pri la malliberigo de la Kuba Kvinopo en Usono)*



ÉDITIONS CERCLE D'ART

ANTONIO SAURA. – « La Force de la solidarité » (1987)

En tiu perspektivo, necesus proponi la starigon de aliaj internaciaj institucioj ol tiuj ekzistantaj, kiuj estas tre ofte en ekskluziva servo de la financkapitalo: la Monda Organizo pri Komerco (MOK), la Internacia Mon-Fonduso (IMF), la Monda Banko, laNord-Atlantika Traktad-Organizo] (NATO) kaj eĉ la Eŭropa Unio (EU), tiaj kiaj ili aktuale funkcias. Sen paroli pri regionaj projektoj kiel la Areo de Liberkomerco de Ameriko (ALKA) kaj la traktatoj inter la EU kaj la AKP-landoj (Afriko, Karibio, Pacifiko).

Tiu kontesto havas sencon nur se ĝi celas ankaŭ la ambicion de Usono, subtenatan de ĝiaj aliancanoj, starigi sian militan hegemonion sur la tuta planedo. Tiurilate, la Proksim-Oriento aperas kiel regiono de usona „unua frapo" pro kvar kialoj:

- ĝi entenas la plej abundajn petrol-resursojn, kaj ties regado donus al Vaŝingtono privilegian pozicion, metante samtempe ĝiajn aliancanojn (Eŭropon kaj Japanion) kiel ĝiajn eventualajn rivalojn (Ĉinio) en malkomfortan pozicion de energia dependeco;
- ĝi situas en la koro de la Malnova Mondo kaj faciligas milit-minacon kontraŭ Ĉinio, Barato kaj Rusio;
- ĝi travivas periodon de malfortiĝo kaj de konfuzo kiu ebligas al la agresanto facilan venkon, almenaŭ por la momento;
- Usono disponas tie pri sekura aliancano, Israelo, kiu posedas atomarmilojn.

La realigo de tiu projekto progresis: Palestino, Irako, Afganio estas okupataj, kaj Sirio kaj Irano minacataj post Libano. Tamen, krom en Irako kaj Afganio, kie la fiasko de tiu ambicio estas evidenta, ĝia malsukceso videblas ankaŭ aliloke: tiel, en Libano, la rezistado de la Hizbolaho] donis multajn problemojn por la israela armeo tamen militsperta kaj superekipita danke al la aerponto starigita el la usona bazo Diego Garcia, en la Hinda Oceano. Ĉiuj klopodoj de Usono kaj de Eŭropo celas do trudi la malarmadon de tiu rezisto-forto kiu estas la libana Hizbolaho, por ebligi facilan venkon al eventuala nova invado fare de Israelo.

*(daŭrigo en paĝo 2)*

### Naŭ centraj temoj de la MSF 2007 en Najrobo

**Eltiro el MSF-Bulteno de la 2-a de januaro 2007:**

Vidu ĉi-sube la kompletan liston de la naŭ ĝeneralaj celoj, kiuj estis deciditaj laŭ la konsultado okazinta inter junio kaj aŭgusto 2006 pri la agadoj, kampanjoj kaj bataloj en kiuj la organizoj partoprenantaj en la MSF estas engaĝitaj :

1. Konstruado de mondo de paco, de justo, de etiko kaj de respekto al la diversaj kredoj ;

2. Liberigo de la mondo el la dominado de la multnacia kaj financa kapitalo ;

3. Certigi la universalan kaj daŭrigeblan aliron al la komunaj havaĵoj de la homaro kaj de la naturo ;

4. Demokratiigo de la konoj kaj de la informado ;

5. Certigi la dignon, defendi la diversecon, garantii la egalecon de la homa specio kaj elimini ĉiajn diskriminaciojn ;

6. Garantii la ekonomian, socian, homan kaj kulturan rajtojn, aparte la rajton je san-prizorgado, je edukado, je loĝado, je laboro kaj je deca laboro ;

7. Konstrui mondan ordon bazitan sur la suvereneco, memdeterminado kaj rajtoj de la popoloj ;

8. Konstrui daŭrigeblan ekonomion centritan sur la popoloj ;

9. Konstrui realajn demokratiajn politikajn strukutrojn kaj instituciojn kun plena partopreno de la popolo en la decidoj kaj en la kontrolado de la publikaj aferoj kaj de la resursoj.

*(el: http://mas-eo.org/article139.html)*

### La Esperanto-Organizoj rekte aŭ malrekte partoprenantaj en la MSF 2007

**La Esperanta Civito**, kun budo, kie estas interalie afiŝita kaj distribuata tiu ĉi gazeto. La Civito estas reprezentata de ĝia senatano Dieter Rooke (vd la kolofonon). **Monda Asembleo Socia (MAS)**, reprezentata de Dieter Rooke (vd la kolofonon). **Universala Esperanto-Asocio (UEA)**, kiun reprezentas Mramba Simba (vd la kolofonon). Kaj ni menciu ankaŭ – kvankam ĝi ne estas pure Esperanta organizo – la asocion **Libero por la Lingvoj**, kiun reprezentas Francisko Simonnet.

*(Vd en paĝo 7 la prezentiĝojn de la Civito kaj de UEA)*

*(Sekvo de p. 1, de Samir Amin: Kia alimondismo?)*

En tiu kadro necesas ankaŭ ĉesigi la hipokritan invokadon, ekskluzive por Irano, de la Traktato pri atoma nedisvastigo (TAN). La nemalhavebla senatomigo devas aplikiĝi al ĉiuj, komencante per la superekipitaj landoj, Usono kaj Rusio ĉekape, sen forgesi Baraton, Pakistanon, Nord-Koreion kaj Israelon (kiuj ne subskribis la traktaton).

En tiu eksplodema kunteksto, en la momento en kiu okazas, de la 20-a ĝis 25-a de januaro en Najrobo (Kenjo), la Monda Socia Forumo, la radikaligo de la bataloj estas tamen ne la opcio elektita de multaj sociaj movadoj. Tio en la nomo de necesa realismo kaj de la zorgo ne izoliĝi en ekstrem-maldekstra koterio. Des pli ke, refoje, etaj radikalaj malplimultoj povas senti sin tentataj proklami sin mem „avangardoj", rifuzi ĉian kritikon kaj fermi la okulojn antaŭ la rapidaj transformiĝoj kiuj tuŝas la nuntempajn sociojn.

Ĉar la malsukceso de la unua historia ondo de eksperimentoj, faritaj en la nomo de „socialismo", estas konfirmita, la kapitalismo ŝajnas al multaj, kaj malĉeeste de reala alternativo, kiel nepreterpasebla horizonto. La popolaj movadoj do ofte donas al siaj bataloj rezignacie modestajn celojn: ja recedigi la novliberalismon, sed nur por promocii alternativojn kiuj parencas kun mastrumado de kapitalismo „kun homa vizaĝo".

MULTAJ AKTIVULOJ – ĉefe en Eŭropo kaj Usono – ankaŭ ne kredas ke la bataloj povas enskribi sin en la sistemon de la nacioj, kadron kiu, laŭ ili, perdis sian trafopovon. Kaj ĉar nacio kaj ŝtato estas grandparte nedisigeblaj, ili disvolvas strategiojn kiuj senhezite ignoras la demandon de ŝtatpotenco, por anstataŭigi ĝin per la batalo ene de la „civila socio" kaj la nigrigo de „parti-politiko". Tiu sinteno estas aparte disvastiĝinta en la Malnova Kontinento, kie multaj donas al si la prioritaton „savi Eŭropon". Kvazaŭ, eĉ en meza tempo, Eŭropo povus esti io alia ol kio ĝi estas.

Fronte al tiuj defioj, la alimondismo, do la projekto konstrui „alian mondon eblan", ekzistas plurale. Ekzistas alimondismo kiun oni povus kvalifiki kiel „molan", kiu inspiras opiniprenojn renkonteblajn same en la riĉegaj socioj (certa „radikala ekologiismo") kiel en tiuj de la malriĉaj landoj en ekstrema situacio (kun la kvazaŭreligiaj aŭ kvazaŭetnaj fundamentismoj). Progresema alimondismo siavice ne uzus tiajn vojojn. Eĉ se ĝi devas fari nepran kaj kritikan legadon de la limoj de la spertoj de la nuntempaj maldekstroj.

Inter ambaŭ situas alimondismo kies partizanoj rekrutiĝas el la mezaj klasoj de la riĉaj landoj, kiuj kritikas la ekzistmanieron kiun proponas la kapitalismo, kelkfoje iom nostalgiaj pri malproksima pasinteco, sed malmulte interesitaj de la realaj zorgoj de la popolaj klasoj, tiuj de sia propra lando, kaj eĉ malpli de tiuj de la Sudo, kie ilia „modera" alimondismo estas ofte ne komprenata. Sed, paradokse, kaj eble nur por sia pli facila aliro al financaj rimedoj, ili ŝajnas superreprezentataj ĉe la mondaj aŭ regionaj sociaj forumoj, kaj kelkfoje perceptataj kiel bremso por fortigo de la popolaj bataloj.

Malgraŭ tiuj diferencoj, kiuj tamen konsistigas unu el la grandaj riĉaĵoj de la alimondisma galaksio, kaj fronte al la ĉefa danĝero kiun prezentas la ebleco de novaj prevent-militoj de Usono, la tuta spektro de alimondismo, de la plej radikala ĝis la plej modera, devus unuigi siajn klopodojn. Jen la sola rimedo por fine konstrui tiun alian mondon eblan kiun deziri ĉiu deklaras.

**Samir AMIN.**

## Minacoj por la informado

**de Ignacio Ramonet** *(direktoro de Le Monde diplomatique)*

LA SKRIBA GAZETARO trairas la plej gravan krizon de sia historio. Ne nur en Francio, sed preskaŭ ĉie en la mondo, la gazetoj, inkluzive de *Le Monde diplomatique*, estas frontitaj de tri jaroj al regula malkresko de sia legantaro. Tio fragiligas ĝian ekonomian ekvilibron, endanĝerigas ĝian supervivon kaj povus do, fine, minaci la plurecon de la opinioj en niaj demokratioj.

La malfaciloj kiujn ĵus spertis, ekzemple en Francio, la taggazeto *Libération*, estas simptomaj por alarma ĝenerala stato de la gazetaro. Se eblas determini ilin, kiuj estas ĝiaj ĉefaj kaŭzoj?

Unue, la apero de la "senpagaj" gazetoj, la "senpaguloj". Tiu nomo estas trompa, ĉar la legantoj kredas ke la informo fariĝas sen kostoj, dum, en la kazo de la "senpaguloj", ili pagas la koston en formo de nevidebla varbo-imposto enkorpigita en la prezo de ĉiu el la produktoj kiujn ili aĉetas. Ene de kelkaj jaroj, tiuj gazetoj ŝoviĝis al la unuaj rangoj de la listo de plej disvastigitaj gazetoj. Kun pluraj sekvoj: multaj homoj ĉesis aĉeti pagendajn taggazetojn; kaj la anoncistoj komencis koncentri sin sur la "senpagulojn". Nu, la vendoj en kiosko kaj varbado konsistigas la du ĉefajn resursojn de gazeto, la tria estas la abonoj.

Aliflanke, Interreto, kiu taŭzas ĉiujn kulturajn praktikojn (muzikon, eldonadon, filmojn, televidon), kaj ne ŝparas la kampon de komunikado. Estas signifoplene ke la ĵusa lanĉado de la nova [franca] internacia inform-ĉeno, France 24, okazis interrete, kaj nur sekvatage per kablo kaj satelito. La nombro da personoj konektitaj interrete, por tie ĉerpi informojn, ne ĉesas kreski.[1] Pro tio, iuj ĉesis aĉeti gazetojn. Ankaŭ ili - kiel la legantoj de "senpaguloj" - do malplenigas la kioskojn. Tio kontribuas al malpliiĝo de tiuj[2] kaj aŭtomate akrigas la malkreskon de la paga distribuado de ĉiuj titoloj, kia ajn estas ilia periodeco.

Interreto fascinas per la granda nombro da disponeblaj senpagaj teksejoj, per la eblo ankaŭ krei tie sian propran esprimilon (blogon), kaj per la facilo interŝanĝi opiniojn pri ĉiuj temoj. Tia avanco, nekontestebla rilate liberecon, havas siajn limojn esprimendajn per almenaŭ du konsideroj. Unue tiu, maltrankviliga: la plej multaj kolektivoj kiuj, pere de interreto, lanĉis sin senkonsidere, kun zorgo pri partopreniga demokratio, en forte intensajn internajn diskutojn kaj debatojn, ofte retrovis sin laŭvorte diserigitaj, disdividitaj, rande de senpoveco aŭ de memdetruo.

POSTE, TIU KONSTATO de la usona esploristo Eric Klinenberg[3]: *"Interreto estis longtempe karakterizita de la senlima nombro da siaj novaj teksejoj esprimanta la diversecon de politikaj opinioj de unu flanko ĝis la alia de la spektro. Sed, nun, la plej popularaj teksejoj estas regataj de la plej potencaj komunikilaj grupoj."* Tio signifas ke, kiel ĉiam en la historio de komunikado, kiam aperas nova komunikilo - de la gazetoj de la 18-a jarcento ĝis la "liberaj radioj" de la 1970-aj jaroj kaj Interreto hodiaŭ -, ĝi donas unue la impreson larĝigi la perimetron de esprimlibereco antaŭ ol retroviĝi en la manoj de la plej grandaj monpotencoj. Kaj normaligita. Jam, la leganto-profiloj, determinitaj per uzado de serĉilo, estas vendataj al komercistoj kiuj deziras pli trafe celi siajn potencialajn konsumontojn...

En Francio, la proprieto de la grandaj komunikiloj estas koncentrita en la manoj de kelkaj industriaj kaj financaj grupoj, inter kiuj du armilfabrikistoj: Lagardère (pere de Hachette) kaj Dassault (pere de Socpresse). Tiu zorgiga konstato devas konduki la civitanojn mobiliziĝi kaj subteni, kontraŭage, la sendependan gazetaron, al kiu apartenas *Le Monde diplomatique*.

Ni memoru ke nia gazeto apartenas, duone (51 %), al la grupo Le Monde kaj, je la alia duono (49 %), al siaj legantoj kaj al la skipo kiu realigas ĝin. Tiu dua eco faras el ĝi preskaŭ unikan kazon de la gazataro ne nur franca, sed internacia. Ĝi konsistigas garantion de totala sendependeco vid-al-vide ĉiujn potencojn, politikajn, komunikilajn aŭ financajn. Forte aprezata eksterlande, tiu unika trajto cetere favoris la ekspansion de niaj internaciaj eldonoj, hodiaŭ sesdeko da, krome en tridek lingvoj.[4] Ankaŭ en tio, ĝi estas unika kazo en la monda gazetaro, sed kiu ne malhelpis la malkreskon de la nombro da niaj aĉetantoj en Francio, nombro de kiu dependas la financa ekvilibro de la gazeto.

POR FARI TIUN KOMUNIKILAN batalon, *Le Monde diplomatique* kalkulas antaŭ ĉio kun la solidareco de siaj legantoj kaj kun tiu de la asocio „Les Amis du *Monde diplomatique"* [La Amikoj de la "Diplo"]. Kaj ĝi faras, ekde la venonta numero, plurajn iniciatojn por bone signi la komencon de tiu nova etapo. Unue, tamen restante pli ol iam ajn fidela al ĵurnalismo respektanta la faktojn, la redakta enhavo enigos temajn ennovigojn kaj novajn rubrikojn. La tuta enpaĝigo estos refarita, kaj la ĉefpaĝo modifita. Ne temas pri "nova formulo", io kion la gazetaro lastatempe misuzis, sed pri signalo por ekmovi kaj mobilizi, kiun nia redaktejo adresas al ĉiuj siaj legantoj.

En niaj kolumnoj, per decido de la redaktejo, la parto de varbado restos limigita al 5 % de niaj spezoj. Jen tre malalta nivelo se kompari ĝin kun la plej multaj aliaj titoloj (pli ol 50 %, mezume). Aliflanke, la prezo - senŝanĝa de kvin jaroj - estos modifita; ĝi pasas ekde la venonta monato al 4,50 eŭroj. Tamen, la prezo por jara abono (40 eŭroj) kaj dujara (73 eŭroj) restos senŝanĝa dum kelkaj monatoj.

Aboni nian gazeton, en la momento en kiu ni faras malsimetrian komunikilan militon fronte al la gigantoj de komunikado, konsistigas samtempe agon de rezistado kaj la plej bonan manieron montri al ni vian subtenon. Ĝi estas ankaŭ engaĝiĝo favore al la libera gazetaro, al la plureco de la ideoj kaj al la vere sendependa ĵurnalismo. Ĝi estas fine la plej efika rebato kontraŭ la minaco de ununura informado.

**Ignacio RAMONET.**

1 Tio validas ankaŭ por nia teksejo (www.monde-diplomatique.fr), kies aspekto estas ĵus komplete refarita kaj la propono de tekstoj por senpaga konsultato ankoraŭ riĉigita.
2 Ene de kelkaj jaroj, la nombro da vendopunktoj en Francio falis de tridek-ses mil al dudek-ok mil.
3 Vd lian artikolon, en http://eo.mondediplo.com/article1173.html
4 Vd Dominique Vidal, "La internacio de la «Diplo»", *Le Monde diplomatique en Esperanto*, novembro 2006


## KOLOFONO

*Le Monde diplomatique en Esperanto*

Eldonejo: Unesko-Grupo Narbonia, Fonto Gazela, FR-11360 Embres-et-Castelmaure, Francio

Speciala eldono por la Monda Socia Forumo 2007 en Najrobo (Kenjo), unua eldono, la 22-an de januaro 2007.

Ĉefredaktisto: Vilhelmo Lutermano (vlutermano@free.fr);

Enpaĝigo: Monda Asembleo Socia (MAS, http://mas-eo.org);

Presado (fotokopiado) en Afriko: Mramba Simba (simbamramba@hotmail.com); en Eŭropo: Dieter Rooke (dieter.rooke@tiscali.ch);

Distribuado: Dieter Rooke (vd supre), Mramba Simba (vd supre);

Budo ĉe la MSF 2007 (distribuejo): Esperanta Civito (civito@esperantio.net)


*Kian rolon havas la komunikiloj en ŝanĝata mondo, en tiuj partoj de la mondo, kie la novliberalismo jam ne havas plenan regadon? En Karakaso (Venezŭelo) okazis kongreso pri komunikado, kiu faris jenan deklaron:*

## MANIFESTO DE KARAKASO, 2006
## Unua internacia kongreso de komunikado survoje al socialismo

ĈI TIUJ ESTAS TEMPOJ de espero ĉar ili estas tempoj de batalo, tempoj en kiuj ni havas la historian respondecon preni sur nin la impulson de komunikila socialisma ofensivo venkonta porĉiame la komunikad-modelon de la kapitalismo.

http://eo.mondediplo.com/article1159.html.

Maljusta sistemo subtenas sin per la maljusteco..., ni estas antaŭ etapo en kiu la mondaj popoloj suferas unu el la plej ferocaj ofensivoj de la kapitalismo kaj imperiismo, ĉefe tiu usona, kaj tiu ofensivo venas ankaŭ akompanata de ideologia ofensivo celanta ke la popoloj akceptu sian destinon kvazaŭ ĉio estus establita kaj determinita. Granda aparato de ideologia reproduktado estas muntita tagon post tago sub la ununura logiko kiun la kapitalismo komprenas, dominadi pli kaj pli bone, sistemo kiu baziĝas ĉefe sur granda aro da medioj kiuj renkontas en la sociala maljusteco sian ĉefan deziron, kaj en la antaŭeniro de la imperiismo sian ĉefan celon.

Ekzistas dominanta komikad-sistemo kiu estas parto de la imperiisma ofensivo, modelo de komunikado kiu celumas kontraŭ la penso. Ĝi subtenas sin per la logiko de la unika diskurso kaj provas forigi ĉian kritikan kapablon antaŭ la realo. Modelo kiu detruas la kulturan identecon, kiu promocias la kverelojn inter popoloj, modelo kapabla kaŝi armean invadon kiel humanan operacion. Ĝi montras al ni kiel paradigmon la kapablon konsumi kaj konsumi pli.

Sed la popoloj ne rezignacias, kaj pro tio ke la alternativoj al la tutmondiĝo de la penso konstruiĝas kaj plifortiĝas ĉiutage, el la koro mem de la subprematoj naskiĝas kaj solidiĝas ŝanĝo-perspektivo trovanta sian vertebraron en modelo de komunikado malsama, kontraŭa al tiu dominanta, modelo de komunikado socialisma, tasko ne delegebla sed kiun devas preni sur sin rekte la laboristoj, kamparanoj, indiĝenoj, la subprematoj, ĉar en tiu komunikad-modelo povas ekzisti neniaj perantoj.

Tiu modelo kontraŭdiras la kapitalisman modelon, ĝi estas mala. Kaj la batalo inter ili ne ebligas paŭzon. La socialisma komunikado baziĝas sur tri ĉefaj kolumnoj por la divolvo de transforma perspektivo de la socio, ĝi baziĝas sur la komunikado farita el kaj por la popoloj, modelo de komunikado kontraŭbatalanta la valoraron promociitan de la kapitalismo sed samtempe konstruanta alternativon por la popoloj. Antaŭ la vertikaleco kaj la altrudo - la revolucio kaj la kreado de la popola povo; antaŭ la vakua ŝovinismo - la unuiĝo de la popoloj; antaŭ la unika penso - la kritika spirito kaj la kolektiva pripenso.

La mondaj popoloj devas preni sur sin la respondecon konstrui alternativon, kaj tie estas kie la promocio de tiu komunikad-modelo iĝas nepra tasko. Estas necese plifortigi la ilojn per kiuj tiu komunikado realiĝas kaj estas nepre antaŭeniri en la politika kaj ideologia maturiĝo de tiuj iloj tiel ke ĝi alportu tion plej bonan en la artiko de la konstruo de perspektivo pri kunvivad-modelo justa kaj solidara.

La socialisma komunikado devontigas sin pasi al la ofensivo, metas siajn ilojn je la servo de la popoloj kaj akceptas la engaĝiĝon kun la popolaj bataloj. Ĝin konsistigas komunikiloj kiuj el la bazoj kontribuas al la integriĝo de la popoloj de la sudo, al la realigo de la Bolivarana Alternativo por Ameriko] (ALBA) el la popoloj, al latinamerika flago por la konstruo de justa socio impulsita de la popoloj kaj la registaroj de Kubo, Venezuelo kaj Bolivio, nepraj referencoj por pensi nin liberaj.
Tiu Unua Internacia Kongreso de Komunikado al la Socialismo estas gravega paŝo en la longa vojo de konstruado de socialisma komunikado. Ĝi igas nin kompreni la bezonon integri nin, rompante la landlimojn de la kapitalismo. Tiu kongreso utilos kiel referenco en la bataloj de la popoloj por sia liberiĝo.

Kiel la glavo de Bolívar, hodiaŭ liaj ideoj kaj revoj piediras tra nia Ameriko kaj ŝirmas sin en la koro mem de la popoloj; kun multaj obstakloj sed kun la konvinko pri tio ke neniam ajn estos kialo tiom valida kiel tiu de la homoj kiuj tagon post tago revas je la konstruado de estonteco justa kaj solidara por la mondaj popoloj.

*Elhispanigis Pablo Foche*

---

*En Brazilo reelektiĝis Inacio "Lula" da Silva kiel prezidanto. Pri la graveco de tiu evento ne nur por Brazilo, sed por la tuta Latinameriko, temas la analizo de Emir Sader.*

## Grava aganto de regiona integriĝo

**de Emir SADER**

POST DISVOLVI DENSAN asociiĝon kun Usono, en la epoko de la prezidanteco de s-ro William Clinton, la tiama brazila prezidanto Fernando Henrique Cardoso (1995-2002) ne delasis de ĝi kiam enpotenciĝis s-ro George W. Bush, en 2001. Tiu alianco favoris la projekton de Areo de Liberkomerco de Ameriko (ALKA), la tezojn de la Monda Organizo pri Komerco (MOK), de la Internacia Mon-Fonduso (IMF) kaj de la [Monda Banko] por la kontinento. Samtempe, danke al s-roj Clinton kaj Anthony Blair, kaj kvankam iliaj politikoj faris nenian rompon kun la malmola kerno de la novliberalismo simboligita de Ronald Reagan kaj s-rino Margaret Thatcher, s-ro Cardoso aliris la kunvenojn de la "tria vojo".

Ekde sia enoficiĝo, en 2003, la prezidanto Luiz Inácio Lula da Silva redifinis la prioritatajn aksojn de la brazila ekstera politiko direktanta ĝin al la Komuna Merkato de la Sudo (Mercosur) kaj al la sud-sudaj rilatoj. La Merkosur trairis tiam mortdanĝeran krizon, viktimo de la tre diversaj ŝanĝpolitikoj starigitaj de s-ro Cardoso kaj de la argentinano Carlos Menem, politikoj akrigitaj de la argentina bankroto de decembro 2001 kaj ties sekvoj. Tiuj tensioj senteble malpliiĝis kun la elekto de s-ro Néstor Kirchner, malfermanta periodon de pli granda kunlaborado inter la du landoj.

Certe, la Merkosur estis daŭre skuata, ĝis antaŭ nelonge, de komercaj konfliktoj inter privataj grupoj de la du landoj, malkonsentaj pri la kvotoj de importado kaj de eksportado de produktoj, kaj de la forlaso de la kompenso-politikoj por la malpli potencaj asocianoj, Urugŭajo kaj Paragŭajo. Sed la eniro de Venezŭelo kiel plenrajta membro kaj la unua kunveno de la Merkosur en sia nova konsisto, en Kordobo (Argentino), en julio 2006 - kun partopreno de la prezidantoj Fidel Castro (Kubo) kaj Evo Morales (Bolivio) -, signifas novan ekiron de la regiona organizo. Ĝi deziras nun subteni la partoprenon de pliaj landoj - inkluzive de Kubo - en la Merkosur kaj etendi la sferojn de integriĝo al projektoj de socia tipo.

LA TEMO DE INTERNACIA politiko praktike forestis en la lasta brazila elekto-kampanjo. Alfrontante la gazetaran premgrupon kiu substrekis insiste lian fiaskon, la prezidanto Lula reasertis la sukcesojn de sia registaro en tiu kampo. La kandidato de la opozicio, s-ro Geraldo Alckmin, malkaŝe rekomendis aliĝi al la liberkomercaj politikoj kaj doni la prioritaton al la rilatoj kun la Nordo prefere ol al la regiona integriĝo kaj al la Sud-Sudaj aliancoj. La diferenco sufiĉe pezis en la rezulto.

Kiam li estis elektita unuafoje, en oktobro 2002, la prezidanto Lula ne estis ĉirkaŭata de progresemaj registaroj - escepte de la venezŭela. Poste, s-roj Kirchner, Tabaré Vásquez (Urugŭajo) kaj Morales demokratie enpotenciĝis. S-ro Hugo Chávez, siaflanke, fortiĝis interne kaj lanĉiĝis, interkonsente kun Brazilo, en tre aktivan internacian politikon. Pro tiu fakto ne atendeblas modifoj en la orientiĝo de la eksteraj rilatoj de Braziljo dum tiu ĉi dua mandato (2007-2011), ĉar la kunteksto montriĝas multe pli favora por la politikoj de integriĝo ol antaŭ kvar jaroj.

La rilato de Brazilo kun Vaŝingtono estis ambigua. Unuflanke ĝi superfluis je amikec-deklaroj, je rektaj kontaktoj inter la du prezidantoj. Aliflanke ĝi estis stampita de esencaj malkonsentoj. La centra malkonsento estis tiu pri la ALKA, kiu devis konduki, en januaro 2005, al naskiĝo de la traktato pri kontinenta liberkomerco, strategia projekto de Usono. Braziljo estis la ĉefa respondeculo de ties blokado kaj kontribuis enterigi ĝin definitive, defendante decideme la postulojn de la registaroj de la regiono - interalie por la demandoj pri patent-pagoj aŭ pri la ebleco por eksterlandaj entreprenoj (aparte usonaj) partopreni en la adjudikadoj de la publikaj servoj...

FRONTE AL TIU OPOZICIO, Usono koncentris siajn klopodojn sur la ofertoj de duflankaj liberkomercaj traktatoj (LKT). La unua, subskribita kun Ĉilio en 2003 [1], malhelpas Santiagon leĝdoni pri ĉia kampo kiu ŝajnas lezi la leĝojn de la merkato - de ekologiaj demandoj ĝis eventualaj problemoj de enskribo-kotizoj en universitatoj. Tamen, Vaŝingtono delogis poste la landojn de Centrameriko kiu havas urĝan bezonon aliri la usonan merkaton. Poste ĝi apogis sin sur la politika-armea alianco kun Kolombio por tie antaŭenigi la subskribon de plia LKT. Kaj faris la samon kun Peruo, antaŭ la venko - sed kun la kunsento - de la prezidanto Alan García. En Ekvatoro, la sukceso de la operacio dependis de la dua baloto de la prezidant-elekto, gajnita la 26-an de novembro de la maldekstra kandidato, s-ro Rafael Correa. Ne kaŝante sian simpation por s-ro Chávez kaj decidita kunvoki Konstituigan Asembleon, li estas kontraŭ la LKT.

SE PRITAKSI LA estonton de ĉiu lando kaj en certa mezuro ankaŭ tiun de la subkontinento, la fundamenta limo ne estas tiu kiu pasus inter "popolisma" maldekstro - Bolivio, Kubo, Venezŭelo - kaj "saĝa" maldekstro - Argentino, Brazilo, Urugŭajo -, kiel asertas tiuj kiuj celas ... dividi la maldekstron. Jen temas pri interpreto kiu provas "alelekti" Brazilon kiel lokomotivon de la regiono, por kontraŭi la pozicion akiritan de Venezŭelo, kaj kontraŭmeti la "respondecan sintenon de Lula" al la "aventurismo de Chávez". Se oni notas kelkfoje rivalecojn inter la du landoj, ekzistas ankaŭ, inter ili, interkonsentoj kaj komplementecoj. La limo pasas en realo inter la landoj kiuj subskribis la LKT kaj tiuj kiuj vetas pri la regiona integriĝo tra la Merkosur, la Sudamerika Komunumo de Nacioj (SKN) [2] aŭ la Alternativon Bolivaran por Ameriko (ALBA), subtenatan de Karakaso, Havano kaj La-Pazo), projekton pli klare antiliberalan.

La dinamismo de lia ekstera politiko faris de s-ro Chávez referencegon en la regiono. [3] Li ĝuas tie grandan influon, ĉar li proponas konkretajn iniciatojn de integriĝo. [4] Braziljo servas kiel ponto inter la membroj de la ALBA kaj la moderaj landoj kiel Urugŭajo, Paragŭajo aŭ eĉ Argentino. Ĝi faras ankaŭ la ligon kun la registaroj kiaj tiu de Limo, en malkaŝa konflikto kun s-ro Chávez dum la perua elektokampanjo. [5] Kvankam Peruo subskribis LKT kun Usono, s-ro García konservas ligojn kaj traktatojn kun aliaj landoj, interalie kun Brazilo.

La regiono spertis certan nivelon de tensio, kiam la bolivia registaro, per la dekreto de la 1-a de majo 2006, anoncis la ŝtatigon de la gaso. La dispono celis, interalie, la brazilan multnacian entreprenon Petrobras. En antaŭelekta kunteksto [de Brazilo], la internaj premoj ekscitiĝis por ke la prezidanto Lula adoptu akran pozicion kaj defendu la "nacian" entreprenon. [6] Tamen, la prezidanto daŭrigis sian intertraktadon kun La-Pazo kaj, fine de oktobro 2006, kiam finiĝis la tempospaco de cent-okdek tagoj fiksita de la bolivia registaro por subskribo de novaj traktatoj kun la dek multnaciaj konzernoj kiuj agas en la lando, Petrobras akceptis la ronĝadon de la eksterordinaraj avantaĝoj kiujn ĝi ĝuis ĝis tiam.

POST SIA REELEKTO, la unua vojaĝo de la prezidanto Lula kondukis lin precize al Venezŭelo, la 13-an de novembro, por inaŭguri ponton kiu, super la Orinoko, faciligos la interŝanĝojn de tiu lando kun Brazilo. Skandalante sian opozicion same kiel tiun de Karakaso, li ĉi-okaze klare subtenis s-ron Chávez por la prezidantelekto de la 3-a de decembro 2006 : *"Kara kompano* (...), *la sama popolo kiel tiu kiu elektis min, kiu elektis Néstor Kirchner, kiu elektis Daniel Ortega [en Nikaragŭo, la 5-an de novembro], kiu elektis Evo Morales, sen ajna dubo elektos vin prezidanto de la Respubliko Venezŭelo."*

Jen kompliceco same kiel danko pro la subteno kiun li implicite aŭ eksplicite ricevis, de la venezŭela prezidanto kiel de s-roj Kirchner, Vásquez, Morales kaj Castro. Kaj recertigita ankriĝo maldekstre.

**Emir SADER.**

---

[1] La Akordo pri Liberkomerco de Nord-Ameriko

*(piednotoj de E. Sader: Grava aganto..., daŭrigo)*

(ALKNA), grupiganta Kanadon, Usonon kaj Meksikion, siavice ekvalidis en 1994.
[2] La SKN entenas la Merkosur kaj la Andan Komunumon de Nacioj (AKN) kaj Ĉilion, Gujanon kaj Surinamon.
[3] Kialo pro kio Usono igis Gŭatemalon prezenti sin kontraŭ Venezŭelo dum la ĵusa elekto al la posteno de nepermanenta membro en la Sekurec-Konsilio. Post tri semajnoj kaj kvardek-sep balotoj, neniu el la du landoj povis akiri la necesajn du trionojn da voĉoj (de la Ĝenerala Asembleo). Ili fine rezignis favore al Panamo, elektita la 7-an de novembro.
[4] Interalie, la regionajn petrolkompaniojn Petrosur kaj Petrocaribe, latinamerikan televidon - Telesur -, la konstruadon de kontinenta gasodukto, diversajn kunlaboradojn pri sano.
[5] Vd Maurice Lemoine, "Peruo, fidela reflekto de Latinameriko", Le Monde diplomatique, oktobro 2006.
[6] Petrobras estas nur parte nacia [ŝtata] entrepreno : la brazila ŝtato tenas 37 % da ĝi, dum 49 % de la akcioj estas en usonaj manoj kaj 11 % apartenas al brazilaj ŝajnaj respondantoj.

---

*La fiasko de ĝia armeo, lastan someron, ŝajnas esti konfuzinta la israelanojn. Ĉu ili estis postulintaj ke ilia lando fine intertraktos kun siaj najbaroj - "revo" (vd la artikolon de Georges Corm : "Disidenta" revo de ĝenerala regulado kiu inspiras novajn internaciajn iniciatojn ? Tute ne estis tiel. Nek la militkrimoj en Libano, nek tiuj faritaj poste en Gazao, nek la nomumo en la postenon de vic-ĉefministro de faŝismema gvidanto vekis amasajn reagojn. Kial ?*

## LA PROMOCIO DE S-RO AVIGDOR LIEBERMAN EN LA REGISTARON

## Kiel Israelo alvenis al tio

**de Akiva ELDAR** (Ĵurnalisto ĉe la taggazeto *Haarec*, Tel-Avivo)

KIO OKAZIS KUN LA israela socio ke ĝi generas rasismajn gvidantojn kiel s-ron Avigdor Lieberman, ĉefo de la ekstremdekstra partio Israel Bejtenu ("Israelo, nia domo"), revene en la registaron kiel vica ĉefministro ? Jen demando senbaza. Pli sagace estus demandi sin, kial tia promocio okazas nur nun, preskaŭ sesdek jaroj post fondiĝo de la ŝtato Israelo.

Ŝajnas tute same senutile demandi sin kial la israelanoj akceptas tiajn kruelaĵojn kiel la eliminadon de tuta palestina familio en la Gaza-strio. Male, oni povus miri ke, post kvardek jaroj da okupado, ne neglektinda nombro da israelanoj ankoraŭ iras surstraten por denunci maljustaĵojn kiel la bombadon de Bejt Hanun.

Ekde sia fondiĝo, Israelo ne ĉesas laŭte fanfaroni ke ĝi estas la sola demokratio en Proksim-Oriento. Kompare kun Sirio, Irano aŭ, en malplia grado, kun Egiptio aŭ Jordanio, Israelo povas certe orgojli defendi demokratiajn valorojn kiel la esprimliberecon, superregon de la leĝo kaj okazigon de liberaj elektoj. Sur struktura kaj formala ebeno, Israelo estas tre evoluinta demokratio ; sed laŭ moralaj normoj, tiu demokratio restas fragila kaj vundebla - ĝi eĉ falis plej profunde. Kontraste al la landoj de okcidenta Eŭropo kaj al Usono, en Israelo ne ekzistas bremsoj kaj kontraŭpezoj kiuj ebligas konservi demokratian ekvilibron ; kaj la civila socio enhavas ankoraŭ loĝantarojn kiuj rekte dependas de ŝtata helpo.

La valoroj de demokratio tute ne estis ankritaj en la politika kulturo kiun la fondintoj de la ŝtato, interalie David Ben Gurion, alportis kun si el orienta Eŭropo. Tiuj homoj unue alfrontis ekzistogravan konflikton inter israelanoj kaj araboj kaj levis la defion de konstruado de nova nacio. Ili agis por idealoj kiel fideleco al la ŝtato, unueco kaj homogenigo de ĝia loĝantaro. Por ili, la ŝtato estis granda fandujo, en kiu tre heterogenaj loĝantaroj, kaj nome la eskapintoj el la juda genocido, konsiderataj kiel "homaj polveroj" [1], devis kuniĝi ĉirkaŭ komunaj konceptoj.

**Sieĝostato**

PRO TIO ILI fervoris por eksteraj signoj de demokratio, kiel okazigo de regulaj elektoj, kaj samtempe limigis, nome de la sekureco, la gazetaran liberecon, nome per armea cenzuro. Ankaŭ nome de sekureco, ili trudis al la arabaj civitanoj de Israelo, de 1948 ĝis 1966, jarojn kaj jarojn da "armea registaro" akompanate de limigoj de iliaj liberecoj. Jen cetere plia pruvo por ne-asimilado de demokratiaj valoroj : la giganta plimulto de la juda loĝantaro, inkluzive de la plej granda parto de la elitoj, akceptis kiel evidentaĵon la politikon de instituciigita apartismo ĉe la arabaj malplimultoj.

La eduksistemo, siavice, prioritatis demandojn kiel fidelecon al la ŝtato, la israela-araban konflikton, antisemitismon kaj militservon. Sub la eta kovrilo de la lernolibroj pri civitana edukado, kun la tasko internigi al la junaj generacioj la principojn de egaleco kaj de demokratio, kaŝiĝis paĝoj plenŝtopitaj de kliŝoj. Ĝis la 1980-aj jaroj, la infanliteraturo priskribis la arabojn kiel malsuperajn estulojn sen nacia identeco kaj soifaj je juda sango. Same okazis en la lernolibroj.

Tiu perceptado de la araboj, tute kiel la negativa rigardo al la gojim - la nejudoj - aŭ la esprimo de forta etnocentrismo, estis gravaj etapoj en la formado de la sento de "sieĝostato" sentata de la israelanoj : tiuj ĉiam konsideris la judan popolon viktimo de la aliaj nacioj. Tiu percepto estas des pli forta ĉar la judoj prezentas al si sian historion, nome siajn du mil jarojn da diasporo, kiel sinsekvon de persekutoj fare de la popoloj inter kiuj ili vivis.

De tiu demonstrado kompreneble la genocido formas la apogeon. Ĉiujare multaj lernejaj establoj instigas siajn gelernantojn pilgrimi al la ekstermo-koncentrejoj de Polujo. Tiuj vojaĝoj ardigas ĉe la lernantoj senton de angoro kaj kontribuas fortigi ilian percepton de judoj kiel viktimoj. Aliflanke, ilia manko da matureco malhelpas tiujn junulojn tiri el la genocido pli ampleksajn instruojn, kiuj povus gvidi ilian vivon kaj nome ilian sintenon rilate la okupadon, kiun ili pretiĝas defendi dum sia militservo. Ili revenas ĝenerale kun simplismaj mesaĝoj kiaj „neniam plu tion“ - alivorte : „Por malhelpi novan katastrofon, ni devas esti fortaj“. Kaj multaj de ili retenas de sia vizito al Aŭŝvico nur ke la nazia genocido kaj pli ĝenerale la historio de antisemitismo donas al la israelanoj apartajn rajtojn, inter aliaj atenci la fundamentajn rajtojn de siaj najbaroj kaj samtempe ĝuante totalan imunecon kontraŭ la kritiko.

Ne estas hazardo ke s-ro Lieberman apartenas al tiuj judoj kiuj elkreskis en USSR antaŭ ol veni al Israelo, kaj ke li ĝuas konsiderindan subtenon inter tiuj enmigrintoj. Pli ol miliono da sovetianoj elmigris al la „promesita tero“ ekde la 1970-aj kaj ĉefe 1990-aj jaroj : ili havas plejparte nenian sperton pri la okcidenta demokratio kaj nenian konon pri la israela-araba konflikto. Ili do montriĝis aparte penetreblaj por la perforta mesaĝo de la dekstraj fortoj, tiom ke ili revas pri fortulo por „remeti la ordon“ en Israelo. La ruslingva gazetaro, kiu disvolvas senĉesan propagandon kontraŭ la araboj kaj la maldekstrularo, ege kontribuas fortigi tiuspecan opinion. Sed la valoroj de demokratio estas fremdaj ankaŭ por la ortodoksaj judoj kiel por la religiuloj de la naciisma dekstro, kiuj ampleksas nun pli ol kvaronon de la israela loĝantaro – proporcio certe pligrandiĝonta, vide al la naskokvoto trioble pli alta ol la nacia mezumo.

La nescio pri tiuj principoj aŭ la indiferento al ili influas ne nur la rilatojn kun la araba malplimulto kaj la konflikton kun la palestinanoj. Ĝi travideblas ankaŭ en la debato inter maldekstro kaj dekstro kiel inter religiuloj kaj laikoj. La murdo al la ĉefministro Ichak Rabin donis la mezuron de la maltoleremo de la israelanoj kiuj konsideras la teron kiel superan valoron fronte al tiuj kiuj juĝas pli grava la klopodon por paco.

Mia retpoŝto estas konstante invadata de ofendaj mesaĝoj kaj de mortminacoj, kies plejparto venas de judoj kiuj ne aliĝas al la ideoj kiujn mi esprimas en miaj artikoloj. Kvankam ili ne diferencas de tiuj kiujn formulas la maldekstro kaj la centro en la demokratiaj landoj, tiuj ideoj en Israelo estas konsiderataj ekstremismaj. Lastan jaron, ortodoksa judo ponardis junan viron kiu partoprenis marŝon de samseksemuloj en Jerusalemo. Ĉijare, sekve al manifestacioj kaj minacoj de ortodoksaj judoj, la polico nuligis la marŝon, pretekstante ke la eventoj de Bejt Hanun kreus situacion kiu ne ebligus al ĝi certigi la sekurecon de la manifestaciantoj.

Preskaŭ sesdek jaroj post sia stariĝo, Israelo ne kreis fortan civilan socion kapablan rezisti al la ekonomiaj kaj politikaj aŭtoritatoj, nek eĉ efikajn agantojn de socio. Tiel, kiam la laborista partio, sola teoria alternativo al la dekstro, partoprenas en registaro kiu totale marĝenigas la Palestinan Aŭtoritaton, kiel la popolo povus distingi inter tio kio estas etika kaj tio kio ne estas tia, inter kio estas demokratia kaj kio ne estas tia ? Kiam la Nobel-premiito, s-ro Ŝimon Peres, helpas la ĉefministron de registaro kiu bombas loĝkvartalojn en Bejruto kaj en Gazao, tiam fariĝas malfacile por la homo de la strato distingi la bonon disde la malbono kaj la bonon disde la malico.

S-ro Ehud Barak, elektita ĉefministro en 1999 kun la voĉoj de la maldekstro kaj de la israelaj araboj, ne ĉesas ripeti, post la fiasko de la pintkunveno de Camp David en 2000, ke tiu „malkaŝis la veran vizaĝon de Arafat“ kaj „malkovris“ ke la palestinaj reprezentantoj „ne estas veraj partneroj“ por starigi ilian ŝtaton apud Israelo. Tiu versio pri la fiasko de Oslo igis multajn israelanojn aliĝi al ekstremaj solvoj, kiel la muro konstruata en Cisjordanio, aŭ la unuflanka separo de s-ro Ariel Ŝaron, aŭ eĉ la projekto de „transloĝigo“ devena de la rasisma repertuaro de s-ro Lieberman.

Al tiuj fundamentaj historiaj, psiĥaj kaj politikaj donitaĵoj aldoniĝis en la lastaj jaroj veraj minacoj : la memmortigaj atencoj de la Hamaso kaj de la Islama Ĝihado, la pafo de raketoj de la Hizbolaho kaj de la Hamaso kaj la irana atomprogramo. Ne pasas tago sen ke la proparolanto de la registaro ne memorigas tiujn danĝerojn. La timo antaŭ la venonta atenco ŝajnas pli konkreta ol la aspiro al paco. La kolektiva angoro - eco de la israela socio - kontribuas daŭrigi la kredon en la milita forto kiel sola garantio por supervivado de la ŝtato, kaj do malfruigi la solvon de la israela-araba konflikto. La israela socio ja faris grandajn progresojn, pasante de la totala neado de la palestina popolo ĝis akcepto de ŝtato en kiu ĝi povu vivi libere. Sed ĝi ne estas plene konvinkita pri tio kaj do ne estas klare decidita forlasi la tutan Cisjordanion. De tio venas la manko de avancoj en la solvado de la konflikto.

La bombadoj de la Hizbolaho sur la nordon de la lando, lastan someron, kreis etoson de esceptostato. La malfortecoj de la registaro kaj de la armeo, ĉe la fronto kiel malantaŭe, ronĝis la konfidon de la israelanoj en siaj institucioj. Jen kio servis kiel saltotabulo por s-ro Lieberman por retroviĝi en la registaro ; kaj ne estas hazardo ke li postulis kaj akiris la postenon de ministro taskita pri strategiaj aferoj. Manke de klara montriĝo de la volo de la israelanoj ĉesigi la sangan konflikton kun la araboj, la Laborista Partio decidis refaldi la standardon de la paco. Kaj, kvankam la usona fratego afiŝas sian volon „demokratiigi la Mez-Orienton“, oni malhisis ankaŭ la flagojn de demokratio kaj de egaleco.

**Fertila grundo**

POLITIKAJ EMINENTULOJ famaj pro esti kleraj kaj liberalaj, kiel la profesorino Juli Tamir, ministro pri edukado, kaj la deputito Ami Ajalon, kunsubskribinto de aŭdaca pacprojekto kun la profesoro Sari Nusseibeh, ne volis naĝi kontraŭflue : ankaŭ ili voĉdonis favore al la promocio de s-ro Lieberman en sia registaro. Krome, inter la „centristoj“, en la politika klaso kiel ĉe la komunikiloj, multaj influhavuloj pledas favore al lia programo. Kaj kion pri la transigo, kiun tiu planas, de neneglektinda parto de la israelaj araboj al palestinaj teritorioj ?
Tiuj moderuloj asertas ke la „ĉefo“ de Israel Bejtenu deziras nur ke „la israelaj araboj ŝanĝu sian israelan ŝtatanecon kontraŭ palestina ŝtataneco“.

La homa historio ne mankas je ekzemploj de situacioj en kiuj longdaŭraj minacoj aŭ ekonomiaj recesioj servis kiel fertila grundo por faŝismaj reĝimoj kiuj trudiĝis perforte, eĉ demokratie. Jen kio okazis en la lasta jarcento en la plej kleraj landoj de la eŭropa kontinento. La situacio de la nuntempa israela socio estas eĉ pli serioza ol tiu de Pollando kaj de Ĉeĥoslovakio en la 1960-aj jaroj : la poloj kaj ĉeĥoj sciis ke ili vivas, sub la komunismo, en nedemokratiaj reĝimoj. Ili turnis sin al aliaj modeloj, kaŝe aŭskultis la okcidentajn radistaciojn kaj internigis en siaj infanoj valorojn de libereco kaj de justeco.

La israelanoj, siavice, ne emas ŝanĝiĝi. Ili estas konvinkitaj ke ilia demokratio estas modelo por iliaj najbaroj, ke ilia armeo estas la plej morala de la mondo. Ili deklamas formulojn, sed forgesas la fundamentajn principojn de la demokratio, inter kiuj la rajtojn de la malplimultoj. La maldekstro, kiu denuncas la minacojn kiuj ŝvebas super la socio, troviĝas en la kaptilo de marĝeniĝo : ĝi ne nur havas nenian influon sur la registaro, sed ĝi faras nenion alian ol proksimigi ĝin al la ekstremdekstro, kiu konstante progresas.

Popolo, kiu forgesas sian pasintecon, povas malfacile konstrui sian identon en la nuno. Sed estas same por popolo kiu apogas sin ĉefe sur la memoro de la pasinteco : ankaŭ ĝi havos malfacilon konstrui alian estonton en nova realeco. La sloganoj kaj la memkontento de la maldekstro ne povas anstataŭi la konstruadon de demokratia socio bazita sur moralaj valoroj. La fiasko de la Liban-aventuro, lastan someron, donis la okazon por malfermi tiun grandan laborejon. La politika kaj armea potenculаro, ve !, preferis militan fuĝon antaŭen.

**Akiva ELDAR.**

---

[1] Ben Gurion parolis pri "homa polvo" kiu, kunveninte el ĉiuj anguloj de la planedo, transformiĝis en suverenan ŝtaton por okupi "honoran lokon en la familio de la nacioj".

---

## "Disidenta" revo pri ĝenerala regulado

**de Georges CORM** (iama libana ministro pri financoj, aŭtoro interalie de "La Question religieuse au 21e siècle [La religia demando en la 21-a jarcento]", La Découverte, Parizo, 2006)

LA USONA REGISTARO, larĝe sekvata de la eŭropaj registaroj, metas tri plej gravajn elementojn en la koron de sia vizio pri ĝenerala solvo de la konfliktoj en Proksim-Oriento : la elradikigon de la Hamaso en Gazao kaj en Cisjordanio kiel de la Hizbolaho en Libano, almenaŭ de iliaj armitaj branĉoj ; la obeigon de la irana kaj siria reĝimoj, kiujn ĝi konsideras kontraŭaj al ĝia politiko de stabiligo de la regiono ; la ĝeneraligon de la demokratio kaj de la juroŝtato en la arabaj socioj de la regiono.

La venko super la proksim-orienta terorismo dependas, laŭ tio, de la sukceso de tiu politiko, kiun la arabaj registaroj, politikaj partioj kaj civila socio devos kun forto realigi. Tiam ĝi ebligos trovi solvon al la palestina problemo, ĉar Israelo, tiel trankviligite pri sia estonteco kaj pri sia paca eniĝo en la regionon, povus redoni kelkajn teritoriojn kaj toleri la aperon de palestina ŝtato.

En la okuloj de multaj okcidentaj komunikiloj kaj politikaj partioj, la agadoj de la usona kaj israela armeoj en la regiono havas nenian alian celon : temas pri liberigi la mondon de la plago de la terorismo kaj regigi pacon kaj demokration. Jen, en kelkaj vortoj, la okcidenta doktrino pri la Proksim-Oriento.

La vizio montrata ĉi tie estas vizio "disidenta", kiun oni traktos kiel malrealisman kaj danĝeran. Tamen ŝajnas al ni necese prezenti ĝin. Ĝi reflektas, laŭ nia kompreno, la aspirojn de multegaj demokrati- kaj pac-emuloj en la regiono - ĉu judoj, kristanoj aû islamanoj. Larĝe inspirita de la juro esprimita de la "internacia komunumo" pri la israela-palestina konflikto ekde 1947, tiu vizio eliras de la saĝa konstato ke la perforto, kiu tuŝas la tutan spacon de Libano, Sirio kaj Palestino, estas grandparte la produkto de la israelaj okupadoj de teritorioj de tiuj tri landoj de jardekoj kaj de la traktado suferata de la okupataj loĝantaroj rompanta ĝeneralajn jurajn principojn kaj humanajn principojn.

1. Konforme al la spirito de la juro esprimita de la Unuiĝinta Naciaro pri la juda-palestina milito, poste pri la israela-araba en 1948 kaj 1949, la tero de Palestino, de Mediteraneo ĝis [ ?Jordano, estas socio malferma kaj plurkomunuma ; nenia religia komunumo havas tie ekskluzivan rajton je politika dominado kaj je armita forto ; Jerusalemo estas malferma urbo mastrumata de urba konsilantaro konsistanta el judoj, kristanoj kaj islamanoj en egala nombro.

2. Konforme al la opinio de la Internacia Justic-Kortumo de Hago en 2004, la murego konstruata de Israelo en Cisjordanio por enfermi en ĝin la originajn loĝantojn de tiu teritorio devas esti senprokraste detruata, por ke la palestinanoj estu totale liberaj je siaj delokiĝoj interne de Cisjordanio kaj al la Gazao-strio. Iliaj delokiĝoj al la ekstero – escepte de ilia eniro en la israelan teritorion – ne estos plu kontrolataj de la ŝtato Israelo, sed ekskluzive de la Palestina Aŭtoritato kaj de la policaj servoj de Egiptio kaj de Jordanio ĉe la teraj limoj de tiuj ŝtatoj. Israelo devas tuj ĉesigi la aeran, maran kaj teran blokadon kiun ĝi tenas por la palestina loĝantaro.

3. La loĝantoj de la israelaj kolonioj starigitaj kontraŭe al la konvencio de Ĝenevo estos rajtigitaj resti en siaj loĝejoj post monkompenso de la ŝtato Israelo por la palestinanoj kies teroj estis konfiskitaj – konsiderante laŭleĝan interezo-kvoton kiu estos tiu de la interbanka kvoto por la deponoj en dolaroj por unu jaro sur la merkato de Londono.

4. Per apliko de la rezolucio 194 adoptita de la Ĝenerala Asembleo de la Unuiĝinta Naciaro la 11-an de decembro 1948, la palestinanoj kaj iliaj posteuloj elpelitaj aŭ fuĝintaj antaŭ la avanco de la israela armeo en 1948, poste en 1967, povos ĝui rajton je reveno al la tuta historia teritorio de Palestino aŭ esti monkompensataj de la ŝtato Israelo.

5. La israela armeo devos, ene de du semajnoj, retiriĝi el la zonoj kiujn ĝi okupas en Cisjordanio kaj en Gazao kaj cedi la lokon al internacia forto de protekto de la palestina loĝantaro de la okupita teritorio.

6. Post sepjara periodo estos organizita referendumo en la teritorioj okupitaj ekde 1967 de Israelo kaj en Israelo mem por scii ĉu la civitanoj de ambaŭ popoloj deziras vivi en unu sola ŝtato, federacia aŭ unueca, aŭ en du separitaj ŝtatoj.

7. Fonduso de monkompenso por la palestina loĝantaro de la okupitaj teritorioj estos starigita, financata laŭ egalaj partoj de la landoj de la G8 kaj la arabaj landoj membroj de la Organizo de Petrol-Eksportaj Landoj (OPEL), kiel kompenso por la okupado kaj la subpremo suferataj dum la lastaj jardekoj.

8. Kia ajn estos la elektita solvo, la israela-palestina ŝtato aŭ la du ŝtatoj israela kaj palestina devos deklari sian neŭtralecon en la internacia ordo kaj ne teni privilegiajn rilatojn, sur armea aŭ politika kampo, kun la grandaj potencoj kaj la regionaj potencoj.

9. La teritorio de la siria Golano okupata de la ŝtato Israelo ekde 1967 estas redonota al la siria ŝtato, kaj senarmeigitaj zonoj de sekureco estos instalitaj ambaŭflanke de la landlimo. La israelaj kolonianoj vivantaj en tiu teritorio estos rajtigitaj resti tie laŭ la samaj kondiĉoj kiel tiuj por la kolonianoj de Cisjordanio. Diplomatiaj kaj ekonomiaj rilatoj estas starigotaj inter la du landoj ekde la instalo de la sekureco-zono kaj la pago de la monkompensoj ŝuldataj de la kolonianoj.

10. Post redono de la libana teritorio de la Fermoj de Ŝebaa ankoraŭ okupata de Israelo, la ŝtato Israelo senminigos la sudon de Libano kiun ĝi okupis dum dudek-du jaroj rompante la rezolucion 425 de la Sekurec-Konsilio pri Libano kaj malhelpante la dislokadon de la Provizore Anstataŭan Forton de la Unuiĝinta Naciaro en Libano (PAFUNL) ĝis la limo inter la du landoj. Senarmeigitaj sekureco-zonoj estas starigotaj ambaŭflanke de la landlimo sub kontrolo de la Unuiĝinta Naciaro. Monkompensa fonduso estas kreota por kompensi al Libano la ripetajn ekonomiajn perdojn kiujn la ŝtato Israelo trudis al ĝi ekde 1968 invokante la rajton je reprezalioj kiun ĝi praktikis en kontinua maniero kaj kun la plej ekstrema senmezureco. Tiu fonduso estos financata laŭ egalaj partoj de la ŝtato Israelo, la landoj de la G8 kaj la arabaj landoj membroj de la OPEL, konsiderante interezojn de malfruiĝo kiel supre difinite.

11. La ŝtato Israelo devas senprokraste liberigi ĉiujn palestinajn kaptitojn de Cisjordanio kaj de Gazao kiel ankaŭ de Libano kaj de Sirio.

12. La palestinanoj fariĝintaj israelaj civitanoj devos ĝui egalajn rajtojn, civilajn kaj politikajn. La israela elektosistemo devos certigi al ili ĝustan reprezentiĝon en la israela parlamento kaj en la lokaj kolektivaĵoj, kaj ankaŭ en la administraj, armeaj kaj juraj institucioj de la lando.

**Georges CORM.**

---

## Ĉe la originoj de kapitalismo LA FUNDAMENTA ERARO DE ADAMO SMITH

*En 1993, por defendi liberkomercan traktaton, la prezidanto William Clinton citis Adamon Smith, kiu, laŭ li, estas demonstrinta, ke "la komercaj kutimoj kontraŭdiras tiujn de la milito ». De antaŭ du jarcentoj, la ideo, laŭ kiu ia natura dispozicio interŝanĝi klerigas la kapitalismon kaj subtenas la pacon, multon ŝuldas al Adamo Smith. Tia genezo de la kapitalismo forgesas nur detalon : la produktad-rilatojn...*

**de Alain BIHR** (Profesoro pri sociologio ĉe la Universitato de Frančkonteo, Francio)

KIAM, KIE, KIEL KAJ KIAL estiĝis la kapitalismo ? Tiuj demandoj fluigas multon da inko de antaŭ du jarcentoj. La kialoj parte rilatas al la malfacileco de la problemaro, al la diverseco de la vidpunktoj kaj de la analizaj premisoj. El tio, ke tiuj demandoj koncernas la originojn, laŭdifine ĉiam malklarajn, la respondoj estas, do, destinataj por senĉese renoviĝi laŭ la plaĉo de la malkovro de novaj historiografiaj materialoj kaj de la elpenso de novaj hipotezoj. Sed tiuj diferencoj rilatas same al starigo de diversaj klarigaj principoj, ĉiu implicanta apartan manieron meti la demandon.

La unua entuta klarigo pri la originoj de la kapitalismo estas tiu, kies formulado akompanis la estiĝon de la klasika ekonomia pensaro, ekde la dua duono de la 18-a jarcento. Estas ankaŭ tiu, kiu de tiam estas plej vaste diskonigita. Ĝi inspiras plu la plejparton de la interpretadoj de kapitalo kaj kapitalismo. Pro siaj originoj, ĝi restas stampita de la premisoj de la liberala pensaro.

Ĝia karakteriza trajto estas la privilegia, eĉ ekzkluziva, atento, kiun ĝi dediĉas al la merkato. Laŭ ĝia perspektivo, la formiĝo de la kapitalo kiel produktad-rilato kaj la disvolviĝo de la kapitalismo kiel produktad-maniero, reduktiĝas esence al la etendiĝo kaj plifirmiĝo de la sfero de la merkataj rilatoj. Ĝi do zorge esploras la aperon kaj progreson de tiuj rilatoj, la kondiĉojn, kiuj ilin favoris, sed ankaŭ la obstaklojn, kiuj ilin implikis, la sinergiojn aŭ, male, la konfliktojn inter la disvolvo de la transmara komerco kaj la politikaj strukturoj ĉe la kerno de tiuj procezoj, la merkatajn formojn, kiuj disvolviĝis danke al ili, ktp. Sen tio, ke estu necese mistaksataj aŭ malatentataj la rifoj trafitaj, kiuj tre ofte bremsis kaj eĉ blokis la antaŭenmarŝadon, la ideo eliĝanta el la kolekto de la studadoj inspiritaj de tiu liberala paradigmo estas, ke la kapitalo kaj la kapitalismo rezultas el la dinamiko, finfine neretenebla, de la merkataj rilatoj, kiuj estas, siavice, rigardataj kiel la normala formo, eĉ kiel la supereminenta formo, de socia rilato.

*(sekvo en paĝo 6)*

*(sekvo de p. 5, Alain Bihr: La fundamenta eraro...)*

**Difino, kiu ignoras la historion**

Oni trovas unu el ties tute unuaj esprimoj ĉe la precipa verko de Adamo Smith, Esploro pri la naturo kaj la kaŭzoj de la riĉeco de la nacioj (1776), kiu estas rigardata kiel fondintaĵo de la klasika politika ekonomio [1]. Ekde la unuaj paĝoj, la aŭtoro formulas sian konvinkon pri la ekzisto en la homa estaĵo de « inklino, kiu emigas lin al komercado, al farado de var-interŝanĝoj, de interŝanĝoj de ajno por aliaĵo », inklino specife homa, el kiu oni ne trovas postsignojn en ia ajn animala specio. Inklino, kies fundamenton Adamo Smith definitive vidas en la reciproka dependeco de la vivantoj en socio, el tio, ke la interŝanĝo estas pli kapabla ol la bonfaremo kontentigi la postulojn de tiu lasta : *« La homo preskaŭ senĉese bezonas la helpon de siaj similuloj, kaj vane li ĝin atendus de ties nura bonfaremo. Li estas pli certa sukcesi se li turnas sin al ilia persona intereso kaj se li persvadas ilin, ke ilia propra avantaĝo konsilas, ke ili faru tion, kion li deziras el ili. Estas tio, kion faras tiu, kiu proponas al aliulo ajnan interŝanĝon ; la senco de la propono estas jeno : 'Donu al mi tion, kion mi bezonas, kaj vi ricevos el mi tion, kion vi mem bezonas.' »*

El tiu interŝanĝemeco rezultas, laŭ Adamo Smith, la tendenco al la intensiĝo de la labor-divido ; ĉiu havas, do, intereson sin specialigi je la speco de afero, pri kiu la naturo, la tradicio aŭ la persona sperto lin plej kapabligis : « Tiel, la certeco povi interŝanĝi la tutan produkton de sia laboro superantan sian propran konsumadon, kontraŭ simila troaĵo de la produkto de aliies laboro, kiu povas esti al li necesa, instigas siavice ĉiun homon dediĉi sin al aparta okupiĝo kaj kultivi kaj perfektigi ĉion, kion li povas havi kiel talenton kaj inteligentecon por tiuspeca laboro. »

Pli simple dirite, por Adamo Smith la komerca interŝanĝo kaj la labordivido, kiun ĝi implicas, samtempe estiel kondiĉo kaj rezulto, estas konsiderataj kiel natura stato (laŭ ĉiuj sencoj de la vorto) de la socio, surbaze de la premiso, ke tiu estas mem nura kunigo de amaso da individuoj pure egoismaj, tio estas, samtempe perfekte memstaraj (ĉar privataj proprietuloj de sia laboro kaj, egale, de siaj produktad-rimedoj) kaj nur movataj de la instigo pri ilia persona intereso ene de ilia reciproka dependeco.

Oni facile konvinkiĝas, ke temas pri mito, en la senco propra de fabela rakonto pretendanta klarigi, ĝenerale, la originojn kaj fundamentojn de la mondo kaj, aparte, de la homaj institucioj, rimarkante, unue, la karakteron propre taŭtologian de la proponata klarigo : Adamo Smith premisas kiel naturan donitaĵon de la socio tion, kies genezon kaj disvolviĝan procezon, nome soci-ekonomian strukturon karakterizatan de kolekto da privataj produktantoj ligataj simple de sistemo de komercaj rilatoj, precize necesas klarigi. Oni poste rimarkos, ke se tio iam estis la natura stato de la socio, la kapitalismo naskiĝintus preskaŭ tuj ĉe la eliro el la prahistorio. Nu, multe mankis ke la afero tiel okazu !

Mi preterpasos tie la gravecon kaj la entutajn ideologiajn (apologiajn) signifojn de tia pens-maniero, kiu kondukas koncepti la kapitalismon kiel finon de la homa historio, kiel idealan staton de la socia disvolvo, ĉar en ĝi plene disvolviĝus la komerca kvintesenco de la socia rilato. Mi konsideros nur du unuarangajn limojn de tiu paradigmo, el la vidpunkto de la nura kompreno de la historia evoluo.

Unue, tiu pensmaniero de liberala inspiro, koncentriĝante precipe, eĉ ekskluzive, sur la procezo de komerca cirkulado fine neglektas kaj eĉ tute kaŝas la rilatojn de produktado, konsideratajn ĉi-tie, striktasence, kiel la tuton de la procezoj, normoj, institucioj kondiĉantaj la unuecon de la produktantoj kaj de iliaj produktad-rimedoj, sen kiu nenia produktado povas plenumiĝi. Nu, antaŭ ol povi encirkuladigi la produktojn de la socia laboro, kia ajn estas ilia naturo, antaŭ ol povi transformi ilin al varoj, necesas komenci per ilin produkti ; kaj estas la kondiĉoj irigantaj tiun produktadon, kiuj definitive determinas la destinon de la produktoj de la socia laboro. Kaj, interalie, la eblon ke tiuj produktoj iĝu varoj. Pro manko de konsidero je la produktad-rilatoj, la esploroj inspiritaj de tiu liberala paradigmo malfacile, aŭ eĉ fiaske, komprenigas la kialojn, pro kiuj, anstataŭ spontane elkoviĝi, la komercaj rilatoj povis disvolviĝi ĉe certaj kondiĉoj kaj cirkonstancoj, kiam aliaj, male, estis al ili sisteme malfavoraj. Ekzemple, kial la vastega ĉina imperio montriĝis relative kalcitrema kontraŭ ili dum jarmiloj, kiam ili spertis rimarkindan ekspansion tra la tuta mediteranea antikveco ?

Due, kaj cetere pro tiu fakto, tiuj samaj esploroj ne komprenas la naturon de la vera revolucio estiĝanta en la produktad-rilatoj okaze de la formado de la kapitalo kaj la sinsekva disvolviĝo de la kapitalismo. Ĉar ne estas propraĵo de la kapitalismo, ke la produkto de la socia laboro tie prenu ĝenerale la formon de varo. Se « la riĉeco de la socioj, ĉe kiuj regas la kapitalisma maniero de produktado anoncas sin kiel 'grandegan akumuladon de varoj' », kiel konstatite de Markso en la enkonduko de la Kapitalo [2], tio devenas, unue kaj esence, el tio, ke la kondiĉoj tiom subjektivaj (la labor-fortoj) kiom objektivaj (la produktad-rilatoj) de la socia laboro mem iĝis varoj. Tio premisas, kiel Markso longe montras, la eksproprietigon de la produktantoj kaj ilian reduktiĝon al la statuso de « liberaj laboruloj », sen alia elekto, krom vendi la solaĵon, de kiu ili ankoraŭ estas proprietuloj, nome sian labor-forton. Alivorte, estas ja ĉe la produktad-rilatoj, kie kuŝas la sekreto pri la eksterordinara ekspansio de la sfero de la komerca cirkulado karakterizanta la kapitalismon kaj pri kiu ĝi fieriĝas : la dua estas nur la aspekto, sub kiu manifestiĝas la unuaj.

Fakte, ne ekzistas iu eksterhistoria dinamiko de kresko kaj disvolvo de la komercaj rilatoj. Ĉie kaj ĉiam, la sfero de la komerca kaj mona cirkulado, sekve la starigo de la komerca kapitalo, kiun ĝi povas naski, restas subordigata al la produktad-rilatoj striktasence : al la reguloj kaj institucioj, kiuj regas la rilatojn de la produktantoj al iliaj produktad-rimedoj, la rilatojn de la produktantoj kaj la neproduktantoj inter ili (la socia divido de la laboro), fine la rilatojn de la produktantoj kaj neproduktantoj al la produkto de la socia laboro. Estas tiuj produktad-rilatoj, kiuj determinas tiom same la eblon, kiel la limojn de la disvolvo de la komerca kaj mona cirkulado, sekve la eventualajn estigon kaj akumuladon de la komerca kapitalo. Tiel same la produktad-rilatoj determinas la formon, la intensecon kaj, definitive, la rezultojn de la neeviteblaj disigaj efikoj, kiujn, retroefike, la disvolvo de la merkata kaj mona ekonomio okazigas ĉe ili. Unuvorte, se la vigla kresko de la merkata ekonomio kaj de la komerca kapitalo sendube efikis kiel unu el la faktoroj de la estigo de la kapitalisma produktad-rilato, bezonas serĉi la kialojn, pro kiuj ilia agado povis, aŭ ne, finatingi tiun rezulton, ĉe la strukturo kaj dinamiko de la prakapitalismaj produktad-rilatoj.

Kaj, el tiu starpunkto, la diversaj produktad-rilatoj aperintaj dum la transiro de la prahistorio al la historio, aŭ dum tiu sama mem, ja ne estas samvaloraj. Tiuj, kiuj strukturas la « aziajn » sociojn ne multe subtenas la disvolviĝon de la komercaj rilatoj kaj ankoraŭ malpli la dissolvan efikon de la komerca kapitalo. Tiuj, kiuj karakterizas la antikvan mediteranean mondon, male, havigas al ili kadron kaj bazon eksterordinare favoran ; kaj, egale, ili montriĝas tre penetreblaj de ties dissolva efiko : tiu ĉi kontribuas, interalie, al la koncentriĝo de la biena proprieto kaj al la eksproprietigo de grava parto de la kamparanaj produktantoj. Sed, tute anstataŭ ol konduki al la estiĝo de la kapitalisma produktad-rilato, la tuto de la procezo nur finatingas la etendiĝon de la sklavismo kaj la stariĝon de plebo subtenata el feŭdismaj motivoj, interalie pro la ekonomia dependeco kaj la politika kuratoreco, en kiuj la biena proprieto tenis plu la komercan kapitalon.

Estas, finfine, la feŭdismaj produktad-rilatoj, tiaj, kiaj ili malrapide formiĝas en la okcidenta Eŭropo dum la plej malproksima Mezepoko kaj plifirmiĝas en la 9-a kaj 10-a jarcentoj, per kunfandiĝo inter la strukturoj hereditaj de la malproksima romia imperio kaj tiuj de la « germana komunumo » importitaj de la invadintoj, kiuj servis kiel forcejo al la maturiĝo de pluraj precipaj kondiĉoj por la formiĝo de la kapitalo. Mi substrekis la fortajn karakterizaĵojn konstituantajn tiujn feŭdajn rilatojn : la posedon, eĉ la proprieton, lasatan al la servutulo, de parto de ties produktad-rimedoj, de ties labora tempodaŭro kaj de la produkto de ties laboro ; la emancipadon de la urboj disde la politiko-ideologia strukturo de la biena proprieto, kio ekde tiam ebligas al ili dediĉi sin al la sola disvolvado de la komerca ekonomio kaj de la komerca kapitalo ; fine, la partigon de la politika povo, kio entute malfortikigas tiun, kaj malebligas la restarigadon de ĉia imperia strukturo.

**Akumulado je la servo de la banko**

EN LA SINERGIO inter tiuj diversaj faktoroj, ĝi mem propra al la feŭdaj produktad-rilatoj, rezultos, unue, la pliviglîĝo de la komerco : unuavice, de la malproksima komerco inter urbaj centroj, la plej lukra el la komercformoj kaj la sola origine malfermata al la agado de la komerca kapitalo ; poste, de la proksima komerco inter la urbaj centroj kaj ties ĉirkaŭantaj kamparoj, pere de la disvolviĝo de komerca metiaro dependanta de la fortikeco de la komerca kapitalo, sed ankaŭ kaj precipe pere de la kreskanta integriĝo de la agrikultura produktado kaj la agrikulturaj produktantoj (servutoj, liberigitaj bienaj posedantoj kaj proprietuloj), rapide rezultiganta pliiĝantajn sociajn diferenciĝojn inter ili, naskanta tavolon de riĉaj plugistoj apud malriĉiĝintaj agrikulturaj laboristoj kaj braklaboristoj jam eksproprietigitaj.

Tiel la feŭdaj produktad-rilatoj rekte kontribuis al la akumulado de la mona riĉeco enmane de komercistoj, uzuristoj kaj bankistoj, kaj tiel same al ties koncentriĝo interalie sub la formo de plurfiliaj komercaj kompanioj kombinantaj la negocajn, bankajn kaj asekurajn praktikojn. Temis pri la unua esenca kondiĉo por la stariĝo de la kapitalismaj produktad-rilatoj.

**Alain BIHR.**

*Tiu teksto estas eltirita el "La prahistorio de la kapitalo", paĝo du, Laŭzano, 2006.*

*(Tradukita de: Jacob Hasbun el la franca.)*

---

[1] Adamo Smith, La riĉeco de la nacioj.
[2] Karlo Markso, La kapitalo, v. 1 .

---

## For la polistirenajn glasojn !

**de Eric KLINENBERG** (Profesoro ĉe la New York University, aŭtoro de Heat Wave : A Social Autopsy of Disaster in Chicago, University of Chicago Press, 2002)

ĈU ESTAS SAĜE lanĉi en la komunikiloj alarmon surbaze de informoj malkovritaj en nekonata, sed ŝajne respektinda teksejo ? En marto 2004, la urba konsilantaro de la kalifornia Alisa Viejo alarmiĝis pro raporto pri la danĝeroj de „monoksido de dihidrogeno", tiom ke ĝi debatis pri la utilo malpermesi la polistirenajn glasojn kies produktado implikas tiun ĥemian produkton. Estas vere, ke la teksejo http://www.dhmo.org/ estas tre alarma :

*„Monoksido de dihidrogeno (DMHO) estas senkolora, senodora, sengusta, kaj ĝi mortigas milojn da homoj ĉiujare. La plimulto de tiuj forpasoj estas rezulto de akcidenta enspiro de DHMO, sed la danĝeroj de monoksido de dihidrogeno ne haltas tie. Iom daŭra elmetiĝo al ĝia solida formo kaŭzas seriozajn damaĝojn por la organismo (histo). La simptomoj de ripeta engluto de DHMO etas ekscesa ŝvitado kaj urinado, kaj kelkfoje sento de pufiĝo, de naŭzo, de vomemo. La manko de DHMO kaŭzas la certan morton de tiuj kiuj fariĝis dependaj de ĝi."* [1]

Pli ol tri milionoj da homoj vizitis tiun teksejon kiu instruis ilin pri „DHMO kaj kancero", „La efiko de DHMO sur la medio" kaj „Uzado de DHMO en la lakto-industrio". La mesaĝoj estas zorgigaj - *„ĉeesta en ĉiu lakto, rivero kaj oceano", „grava elemento de acidaj pluvoj"* - ĝis la momento en kiu oni komprenas, ke monoksido de dihidrogeno estas en realo... H2O (do akvo) kaj ke la koncerna teksejo estas eduka satiro farita de profesoro pri informadiko. La urba konsilantaro de Alisa Viejo eksciis pri sia eraro ĝuste antaŭ ol voĉdoni por restrikto de ĝia komunumo uzi... akvon. Post tio, ili uzas la Teksaĵon kun pli da singardemo.

**Eric KLINENBERG.**

---

[1] Vd la teksejon http://www.dhmo.org/.

## La „DIPLO“ kaj la Amikoj : du partneroj solidaraj

**de la REDAKTEJO**

POR ALFRONTI LA strukturajn sekvojn kiujn spertas la presita gazetaro, kaj kiuj ne ŝparas *Le Monde diplomatique* (vidu la ĉefartikolon de Igancio Ramonet), nia gazeto disponas pri grava subteno : la socio La Amikoj de Le Monde diplomatique (AMD).

Fondita en 1996 por mobilizi la financajn subtenojn por ebligi al la Diplo certigi sian sendependecon per starigo de aŭtonoma eldona societo (kiu tenas 25 % de la akcioj), la asocio certigas la disvastigon kaj diskutadon en la socio de la analizoj produktataj de la gazeto. Tio, precipe, per centoj da debat-renkontiĝoj organizataj ĉiujare en Francio kaj en pluraj aliaj landoj fare de libervolaj korespondantoj. Ĉiumonate oni trovas en la gazeto la liston de tiuj debat-renkontiĝoj en niaj kolumnoj.

Kontraŭ la malboniĝo de la informado, la AMD kaj la *Diplo* estas du partneroj dense ligitaj de komunumo de komuna vizio kaj de la volo garantii la rajton informi kaj esti informata. Pro tio, la fortigo de la AMD estas strategia prioritato por la skipo de la gazeto. Ni alvokas do niajn legantojn aliĝi al tiu asocio kaj engaĝiĝi en ĝiaj agadoj. Tio estos aparte efika maniero subteni la klopodojn de la Diplo kaj daŭreme garantii ĝian parolliberecon.

**LA SKIPO DE *LE MONDE DIPLOMATIQUE*.**

Por scii pli pri la AMD – en la franca : Les Amis du Monde diplomatique, 3, avenue Stephen-Pichon, FR-75013 Paris. Tel. : 01 53 94 96 75.
Retpoŝte : amis@monde-diplomatique.fr
Teksejo : http://www.amis.monde-diplomatique.fr/

**Aldono de Le Monde diplomatique en Esperanto :**

En Esperanto, oni povas konsideri MAS (Monda Asembleo Socia, http://mas-eo.org/) kiel ian subten-asocion por la Esperanta versio de la gazeto.

Tamen, la Esperanta versio, en la reto komplete senpaga, profitas la ĉiutagan laboron de la „gepatra“ domo en Parizo. Por subteni tiun nian francan skipon - kaj do la bazon de ĉiu nia laboro - evidente necesas subteni ĝin diversmaniere, kaj pro tio utilas aliĝi al la diverslandaj filioj de AMD, kiuj laboras en la diversaj landoj kaj kun la respektivaj laborlingvoj. Per tio, vi havos la subtenon de nia „gepatra domo“ por organizi debat-renkontiĝojn en via urbo.

Estas du manieroj engaĝiĝi en via lando kaj via gepatra lingvo en la agado de AMD :

1. aliĝi al la ekzistanta AMD de via urbo aŭ de via lando ;

2. se tiu ankoraŭ ne ekzistas, fondi ĝin kun unu aŭ du aprezantoj de la Diplo.

Se vi regas iomete la francan lingvon, vi povos informiĝi ĉe la supraj adresoj pri la ekzisto de AMD en via urbo aŭ en via lando kaj eventuale peti konsilojn por fondi ĝin, ĉiam menciante ke vi venas de la Esperanta eldono.

Se vi ne regas la francan, skribu la samon en via gepatra lingvo kun traduko al Esperanto. Se ili komprenas nek unu nek la alian, ili plusendos vian mesaĝon al ni, kaj ni tradukos por ili.

**REDAKTEJO DE *LE MONDE DIPLOMATIQUE EN ESPERANTO*.**

---

*Jen la teksto per kiu* **Dieter Rooke** *(senatano de la* **Esperanta Civito**) *prezentas ties partoprenon en la Monda Socia Forumo, prenita el la reta informservo HeKo (fonto sube):*

*Citinte la naŭ ĝeneralajn celojn laŭ kiuj estos organizataj la aktivecoj de la partoprenantoj en la Monda Socia Forumo (Najrobo 20-25 januaro 2006), li skribas:*

En la Esperanta Civito ekzistas personoj kompetentaj por solide kontribui al la pritrakto de la temo 7, kiu fakte kombiniĝas al la temo 9. Nature eblas interveni ankaŭ pri 5, sed ĝi estas tro vasta kaj disperda; kaj plie, certagrade, korolario al la eventualaj orientiĝoj pri 7 kaj 9. Tial la Civita delegacio koncentriĝos je la temo 7.

Najrobo estos la dua MSF kie ĉeestas oficialaj reprezentantoj de la Civito: en 2006 c-ano Johano Negrete reprezentis nin en Karakaso.

Karakterizas nian ĉeeston en MSF ne la ekskluziva deziro "vendi" la lingvon, sed la prioritata klopodo montri al la mondo tion, kion la esperanta popolo havas por diri, kiel pozitivan kontribuon al la debato. La Civito estas la sola transnacia esperanto-realajho en konstantaj rilatoj kaj kun la mondcivitana kaj kun la mondfederisma movadoj. La geopolitikaj studoj plej evoluas en la medio de la Pakto ol aliloke en Esperantio. Tial ni esperas esti sufiche preparitaj por alfronti la diskutojn en Najrobo.

**Sen. Dieter Rooke**, Vickonsulo pri socialaj aferoj

*[HeKo 317 5-C, 6 dec 06]*

---

**Renato Corsetti**, *prezidanto de* **Universala Esperanto-Asocio (UEA)**, *klarigas ties partoprenon en la Monda Socia Forumo:*

## Esperanto: lingvo de evoluo. Kial ni partoprenas ĉiujare la Mondan Socian Forumon

Universala Esperanto-Asocio ĉiujare partoprenas la Mondan Socian Forumon en kiu ajn parto de la mondo ĝi okazas. Kial ni partoprenas? Ni partoprenas, ĉar ni pensas, ke Esperanto estas parto de la tutmonda klopodado por pli justa mondo. Ni ne vivas en vakuo kaj ni ne interesiĝas pri lingvistikaj demandoj. Ni interesiĝas pri demandoj de potenco inter la homoj de malsamaj landoj kaj pri la uzo de lingvo kaj kulturo kiel ilo de imperiismo kaj subtenilo de aliaj formoj de imperiismo.

Mi volas aldoni ion. Kiam oni parolas pri historiaj faktoj ĉiuj pli malpli konsentas pri la bonuloj kaj la malbonuloj de difinitaj faktoj en la historio. En la 30-aj jaroj bonuloj estis la judoj kaj malbonulo estis Hitler.

Kiu estas la nuna Hitler kaj kiuj estas la nunaj judoj? Estas tre malfacile kompreni kaj diri tion, ankaŭ ĉar la komunik-kanaloj de la nuna Hitler diras al vi 24 horojn tage, ke Hitler estas iu alia (antaŭe Ĥadafi, poste Sadam kaj poste aliaj). Bedaŭrinde la kapablo de la homo distingi veron de malvero estas la sama kiel en la 30-aj jaroj, kaj facile oni kredas ke Norda Koreujo minacas la mondon, kvazaŭ temus pri io kredebla (mi devas mortigi ĉi tiun muŝon, ĉar ĝi volas detrui nian urbon).

Gratulojn al la partoprenantoj en ĉi tiuj forumoj, kiuj apartenas al la parto d ela monda loĝantaro, kiu pridemandas sin pri la justeco de la internaciaj rilatoj en la mondo de la *Pax Americana*. Eble ni povus interesiĝi ankaŭ pri la ebla rolo de Esperanto en la sudo de la mondo. Por kompreni tion pli bone ni estas ĉi tie.

Ni scias, ke multaj esperantistoj nuntempe pensas, ke Esperanto havos sian finan venkon en Eŭropo kaj laboregas por tio.  Tio estas io bona, aŭ, prefere, tio estus io bona, se la ĉefurbo de Eŭropa Unio estus en Bruselo kaj ne en Vaŝingtono. Tiom longe kiom la vera decido-centro pri tio, kion la eŭropaj instancoj devas decidi, restas en Vaŝingtono, la venko de io, kio ne estas la lingvo de la mastro, restas revo. Tamen temas pri utila revo, ĉar ĝi donas al la eŭropaj esperantistoj la puŝon por proponegi Esperanton, antaŭvidi la eblecon de ĝia venko kaj esperi.

La eŭropaj esperantistoj, do, sekvas strategion, kiu baziĝas pli sur la decidantoj ol sur la normalaj homoj, kiuj malpli kaj malpli ŝajnas voli lerni Esperanton (kvankam tio ne estas tute vera, se oni atentas la retajn kursojn).

Ni, aliflanke, restas konvinkitaj, ke decidan progreson en la nuna momento Esperanto povas ricevi nur en la tria mondo, ĉar tie homoj ankoraŭ estas sentemaj al ideoj pri socia justo, ĉar tie la homoj ankoraŭ esperas, ke oni povas plibonigi la mondon, ĉar tie ili ankoraŭ ne posedas ĉiujn rimedojn de moderna komunikado, per kiu la imperio perfunelas al la tuta mondo sian kulturon, siajn valorojn kaj la kredon pri la neceso de la imperio (ĉiam estis imperioj).

Mi kredas ke venas nun la momento, kiam la neeŭropaj esperantistoj kaj ĝenerale la neeŭropaj homoj devas konscii pri ĉi tio, kaj anstataŭ resti ĉe la strategio: "Bonŝance tiuj en Eŭropo espereble sukcesos!", ili devas ellabori propran strategion.

Mi ne kredas, ke la atento al kaj la atendo de tio, kio okazas aŭ ne okazas en Eŭropo, portos nin ien. En Azio, en Afriko, en Ameriko kaj en Oceanio la lukto kontraŭ la lingva kaj la kultura imperiismo kaj sekve la internacia lingvo Esperanto havas multe pli da ŝancoj, laŭ mi, ol en Eŭropo. La ŝancoj estas de alia speco. Ili baziĝas pli sur la normalaj homoj ol sur la decidantoj. Sed, atentu, ankaŭ en la tria mondo registaroj estas influeblaj de normalaj civitanoj, eble eĉ multe pli ol en la unua mondo, kie eĉ marŝoj de milionoj da homoj ne sukcesas kontraŭpezi la militemon de unu registaro. Ankaŭ en la tria mondo, eĉ pli facile tie, oni sukcesas konvinki parlamentanojn fari leĝojn laŭ kiuj oni rajtas instrui Esperanton en lernejoj.

Mi kredas ke estas tempo malfermi inter ni debaton pri tio, kion devas revi aziaj, afrikaj, amerikaj kaj oceaniaj subtenantoj de justaj lingvaj rilatoj en la mondo kaj sekve de Esperanto. Sen revoj ni ne atingos ion ajn konkretan. Ni lasu la eŭropanojn revi siajn revojn, sed ni revu niajn.

Kiel unuan kontribuon al ĉi tiu esperata debato mi donas mian ideon: ni lanĉu la devizon “Esperanto: lingvo de evoluo”. Tiun ideon donis al mi la legado de la Raporto pri Homara Evoluo de la Evolu-Programo de Unuiĝintaj Nacioj de la jaro 2004.

La unua frazo de tiu programo, per kiu mi volis komenci ĉi tiun tekston, estas: *“En tempo, kiam la nocio pri universala lukto inter civilizoj resonas tiel potence – kaj zorgodone – tra la tuta mondo, trovi respondojn al la malnova demando, kiel mastrumi kaj malpliigi konfliktojn pri* ***lingvo****, religio, kulturo kaj etneco, reakiris novan gravecon. Por laborantoj pri evoluo tio ne estas abstrakta demando.”* La frazo apartenas al la enkonduko de Mark Malloch Brown, direktoro de la Programo de UN pri Evoluo. Se eĉ tiel altranga funkciulo de UN venis al tia konkludo post trastudo de la situacio en la tuta mondo, devas esti io en tio.

La raporto en centoj da paĝoj kaj da statistikaj tabeloj montras kelkajn aferojn tre gravajn ankaŭ por ni.

* Ŝtatoj elspezas enormajn sumojn por instrui siajn infanojn, foje nur, pri la ekskoloniaj lingvoj. Rezulte infanoj estas malfeliĉaj kaj forlasas la lernejojn. Tiuj sumoj devus iri al lernejoj en la lokaj lingvoj, kiujn infanoj jam parolas denaske. Ili havus psikologiajn avantaĝojn kaj estus mono por plibonigi la lernejajn sistemojn.

* Ŝtatoj elspezas enormajn sumojn por instrui fremdajn lingvojn, senutilajn por 99% de la civitanoj en la posta vivo. Kiom da argentinaj infanoj laboros en la borso de Nova Jorko?

Per frakcio de tiuj sumoj oni povus instrui Esperanton, kaj la cetero povus ankoraŭfoje esti uzata por la plibonigo de la instruaj strukturoj, por la sano de infanoj kaj patrinoj, ktp.

Do, sufiĉus al, ni diru, Urugvajo rezigni pri instruado de la angla en siaj lernejoj favore al Esperanto por ŝpari kolosajn sumojn, kaj nur dio scias, ĉu Urugvajo bezonas aŭ ne bezonas tiujn sumojn por evoluo. Sufiĉus al Tanzanujo rezigni pri instruado de la angla favore al la

sŭahila por havi pli da rimedoj por konstrui lernejojn, ktp. La nuraj malgajnantoj estus la landoj, kiuj vendas kulturajn varojn en sia lingvo, sed tiuj landoj jam estas alte evoluintaj.

Ĉi tiu estas kazo, en kiu Esperanto rekte helpus por la evoluo de la tria mondo. Temas nur pri unua penso pri la temo, sed triamondaj civitanoj certe kapablas pensi pli efike kaj alveni al strategio ĉirkaŭ la temo: kiom multe ili elspezas por instrui al si mem la lingvojn de la eksaj koloniaj mastroj? Kun kiuj rezultoj? Kie estas tiu konkurado en la monda merkato, per kiu oni pravigas la lernadon de la angla? Ĉu solvo kiel la internacia lingvo Esperanto povas helpi la landojn de la tria mondo kaj samtempe ne formanĝi iliajn kulturojn, kiel faras la eŭropaj lingvoj?

**Renato Corsetti**
Universala Esperanto-Asocio
Nieuwe Binnenweg 176
NL-3015 BJ Rotterdam
<uea@co.uea.org>

---

## Fina deklaro de la kontraŭpinto de la sociaj movadoj de Latinameriko, Karibio kaj Eŭropa Unio en Vieno (2006-06-14)

*Plenkunsido (pritaksado kaj plua kunlaborado) : 14-an de junio, 18-a horo, Das Jetzt, Parhamerplatz 16, 1170 Vieno*

*- Prezento kaj diskuto de la rezultoj de la alternativa pintkunveno. Kion ĝi signifis por Latinameriko kaj ĝia triopo Venezŭelo, Bolivio kaj Kubo, por Eŭropo kaj la Eŭropa Unio ?*

*- Posta prilaborado de la alternativa pinto. Kiel ni povas plej bone dokumenti kaj disvastigi tiun historian eventon per bildo kaj sono ? Kio fariĝu la hejmpaĝo ?*

*- Mezlonga kaj longtempa perspektivoj. Kiam kaj kie okazu la venonta(j) internaciaj retiĝaj renkontiĝoj ? Kiel ni povas antaŭenigi la ideon de Enlazando Alternativas en la kadro de ankoraŭ pli detale difinenda politika dialogo ?*

### FINA DEKLARO

**ENLAZANDO ALTERNATIVAS [kunplekti alternativojn]** 2, 10-a ĝis 13-a de majo 2006

La sociaj movadoj diras „ne“ al liberkomerco inter la Eŭropa Unio kaj Latinameriko

Ni gehomoj el sociaj kaj politikaj movadoj kaj organizoj el Latinameriko kaj Karibio kaj el Eŭropo kunvenis inter la 10-a kaj 13-a de majo 2006 en Vieno por esprimi nian oponon kaj nian rezistadon kontraŭ la novliberala politiko de liberkomerco, kiun la registaroj de ambaŭ regionoj trudas al niaj landoj kaj kiun ili proponas kiel kadron por nova traktato pri partnereco. Ni rifuzas la provon de la Eŭropa Unio starigi ĝis 2010 en ambaŭ kontinentoj zonon de liberkomerco, same kiel ĝian strebadon profundigi la jam ekzistantajn traktatojn kun Meksiko kaj Ĉilio kaj starigi similajn traktatojn kun la Merkosur kaj Centrameriko kaj la Anda regiono. Ni kolektiĝis ankaŭ por antaŭenigi politikan kaj socian dialogon inter niaj popoloj ; ni postulas nian rajton prezenti alternativojn, kaj ni fidas nian kapablon ellabori ilin.

En Latinameriko kaj Karibio kreskas la rezistado kontraŭ la agresa kaj elraba politiko de la potencego en la nordo, al kiu aldoniĝis hodiaŭ ankaŭ la rezistado kontraŭ la provoj de la Eŭropa Unio trudi al ni novliberalan politikon. Sed kreskas ankaŭ la rezistado de la eŭropaj loĝantaroj kontraŭ la novliberala politiko de ĝia propraj registaroj kaj aparte de tiuj eŭropuniaj institucioj, kiuj volas malmunti la historie kreskintajn sistemojn de sociala protekto, kiuj estis apartaĵo de tiu regiono. Ni antaŭenigas la tutmondigon de larĝa socia rezistado de ĉiuj homoj, kiuj kuniĝas el sia pozicio de ekskludo, senlaboreco, marĝeniĝo aŭ de rekta subpremo, por haltigi tiun procezon kaj por konstrui alian mondon.

La zorgigaj evoluoj, kiuj kunigis nin jam en Rio kaj Madrido kaj kiuj fine en majo 2004 en Gŭadalaĥara [Guadalajara], Meksikio, estis la kialo por krei la sociajn renkontiĝojn „Enlazando Alternativas - kunnodi alternativojn“, daŭre ekzistas en Latinameriko kiel en Eŭropo. La spertojn kiujn ni kolektis en dek jaroj da Nordamerika Liberkomerca Areo (NALKA, angle NAFTA) kaj en ses jaroj da „partnereco“ kun la Eŭropa Unio, estas sufiĉe klaraj por argumente pravigi nian politikan pozicion kontraŭ la liberkomerco, kiu bazas sin sur netravideblo kaj malegaleco en la rilatoj inter riĉaj kaj malriĉaj agantoj.

Ekzemplo por tio estas la procezoj de malindustriigo kaj de malkonstruado de publikaj servoj, kiuj kondukis Latinamerikon en situacion de kronika malriĉeco kaj socia ekskludo. En Eŭropo, tiu sama novliberala ondo montriĝas en la Bolkestejn-direktivo, en la ideologio de la eŭropa konstitucio, en la premo por malaltigi la labornormojn, en la krizo de la socialŝtato, en la minaco por la agrokulturaj geproduktistoj kaj por la nutraĵa suvereneco kaj ankaŭ en la kreado de malamika etoso kun kreskanta socia malintegrado, ksenofobio, perforto inter la sekso, urba perforto kaj aliaj simptomoj : videblaj rezultoj de tutmonda krizo, en kiun kondukis nin tiuj ĉi jaroj de la vaŝingtona interkonsento.

Ni malkonsentas kun la rolo de la transnaciaj entreprenoj de Eŭropo en Latinameriko. Ili tute ne estas faktoro de disvolvado kaj de socia paco, sed kaŭzis amasajn konfliktojn, aparte koncerne la aliron al publikaj servoj (ekzemple akvo, elektro, telefono). Ili antaŭenigas la ekspluatadon de la naturresursoj kaj la detruadon de la medio. La negativaj sekvoj de tiu modelo estas ankoraŭ fortigitaj per la enkonduko de liberkomerc-traktatoj kaj de grandaj infrastruktur-projektoj kiel la Integrad-Iniciato de la Regiona Infrastrukturo de Sudameriko (IIRSA) kaj de la Plano Puebla Panamá (PPP).

Koncerne akvon, tiun komunan havaĵon de la homaro, la privatigaj procezoj ĉe publikaj servoj en diversaj latinamerikaj landoj kaj regionoj donis al la eŭropaj entreprenoj grandan okazon por profit-altigo kaj samtempe subfosis la decidopovon de la loĝantaroj pri siaj landoj kaj sia vivo. Ni kuraĝas aserti ke tiuj entreprenoj maksimumigis siajn profitojn surkoste de la sano, de la vivkvalito kaj de bonstato de larĝaj partoj de la loĝantaroj.

La eŭropaj petrolkonzernoj ekspluatis de jardekoj la fosiliajn brulaĵojn de Latinameriko kaj ĉe tio detruis homojn, komunumojn kaj la medion. La rilatoj inter Latinameriko kaj la Eŭropa Unio estu male bazitaj sur la respekto de la suvereneco de la latinamerikaj landoj, sur la respekto de la resursoj kaj de la reŝtatigo de la fosiliaj brulaĵoj, kiu komencis en la regiono.

Aliro al tergrundo estas fundamenta homrajto, same kiel la defendo de la komuna terproprieto de la etkamparanaj, de la indiĝenaj kaj de la afrikdevena loĝantaroj de Ameriko, kiuj hodiaŭ estas minacataj de la programoj de la individua terdistribuado de la internaciaj organizoj. Ni decidiĝas por vera agrarreformo kaj insiste ripetas, ke la naturresursoj kaj la tradicia scio kiel la biodiverseco estas komunaj havaĵoj de la popoloj, do havaĵoj ne komercigeblaj. Ni estas kontraŭ kulturado de gene modifitaj plantoj kaj kontraŭ la modelo de eksportado de agrokulturaj produktoj, kiu kondukas al forpelo de tutaj komunumoj kaj al kolapso de etkamparanaj ekonomioj.

La Eŭropa Invest-Banko montras kreskantan intereson por financado de investoj en Latinameriko, kies sekvoj neniigas la avantaĝojn, kiujn la financhelpo de tiu banko alportis al la loĝantaroj de la kontinento.

En tiu scenaro de novliberalaj strategioj, kiuj estas subtenataj de la eŭropaj registaroj kaj realigataj de la eŭropaj entreprenoj, okazas la pintkunveno de la ŝtatestroj de Latinameriko kaj Karibio kaj de la Eŭropa Unio, kiu ripetas agendon plenan je senenhavaj promesoj, destinitaj por kaŝi la verajn intencojn, nome la rapidigon de subskriboj de duregionaj liberkomerc-traktatoj. Samtempe la Eŭropa Unio daŭrigas sian ampleksiĝadon, kiu baziĝas ĉefe sur novliberala orientiĝo, kiu nepre kondukos en ĝia interno al novaj kaj pli profundaj krizoj.

Koncerne la eblecon de interkonsento pri asociiĝo inter ambaŭ regionoj, tiu, por esti justa kaj por niaj loĝantaroj avantaĝa, devas ne troviĝi en la kadro de liberkomerca traktato. Ni ne volas „liberkomercon“ inter Eŭropo kaj Latinameriko. Ni volas komercajn interkonsentojn inter ambaŭ regionoj, kiuj kontribuu al bonfarto de niaj loĝantaroj, favoru la suverenecon de niaj landoj kaj ne detruu nian medion. Ni estas kontraŭ liberkomerco kiu okazas en la intereso de la eŭropaj konzernoj kaj de la latinamerikaj eksport-elitoj.

Ni taksas la politikan dialogon kaj la kunlaboradon, kiuj estas al ni proponitaj, senenhavaj. En la stato, en kiu troviĝas Eŭropo, la eŭropaj registaroj ne estas aparte taŭgaj por paroli pri socia kohereco. Por paroli pri politika dialogo, necesas la ekzisto de dondiĉoj por vera partopreno de la sociaj movadoj, kiu devas ne limiĝi al la nivelo de konsultadoj. La kunlaborado devas esti instrumento utila por niaj loĝantaroj kaj ne, kiel nun, agresa instrumento bazita sur pure merkantila retoriko kaj kiu favoras la ekspluatadon kaj la kontroladon de niaj landoj, resursoj kaj publikaj havaĵoj.

La sesioj de la Permanenta Tribunalo de la Popoloj pri la novliberala politiko kaj la eŭropaj konzernoj en Latinameriko malkaŝis la sistemecon de la sinteno de tiuj entreprenoj, iliajn ligojn kun leĝdonado kiu subtenas tiun politikon, kaj la subtenon de internaciaj institucioj kiel la Monda Organizo pri Komerco (MOK), de la Monda Banko kaj de la Internacia Mond-Fonduso (IMF) por la bonfarto de iliaj profitoj. La logiko kiu ĉe tio dominas kondukas al kuratelo kaj al rompo de la rajtoj de la konsumantoj, laboruloj kaj loĝantaroj ĝenerale. Ni konsideras tial plej grave, krei duregionan spacon de observado kaj akuzado de la transnaciaj entreprenoj, por ĉesigi la despotecon kiu rezultiĝas el ilia mondvasta potenco.

La sekureco en la mondo post la tempo de la malvarma milito ne estas garantiata de retorika kontraŭmeto de unupolusa kontraŭ multpolusa mondo. Tiu kaŝas perversan ludon, kiu kombinas implicitan konsenton por militema politiko kun formala rifuzo de tiu politiko. Tiu unupolusa praktiko kaŭzis en la tuta mondo milojn da viktimoj, kaj la kontraŭleĝa milito en Irako kaj la tuja ebleco de ankoraŭ pli ampleksa miltio kontraŭ Irano demonstris la fiaskon de la propraj pacpromesoj. Latinameriko ne povas toleri la novkolonian politikon kun ĝia geopolitika kalkulo de la Eŭropa Unio, ĉeestanta en ties traktatoj.

Ni engaĝas nin por multflanka ekonomi-sistemo, kiu regulas la kapitalfluojn, subtenas la komplementecon de niaj ekonomioj, kiu difinas klarajn kaj justajn regulojn de la komercrilatoj, kiu helpas fermi la ekonomian abismon inter Sudo kaj Nordo. Anstataŭ tio, tiu abismo estas ankoraŭ grandigata per la konstante kreskanta ekstera ŝuldo. Ni parolas do pri multflanka sistemo, kiu estas evidente alia ol tiu de la Monda Organizo pri Komerco MOK. Zorgigas nin, ke la profundigo de la nunaj ekonomiaj malegalecoj kaj la perdo de laborlokoj kondukas ĉe unu flanko al pli forta migrado kaj ĉe la alia, eŭropa flanko, al kreskanta „hermetikiĝo“. Tio estas scenaroj, kiuj „eĉ subtenataj de la terorismo-paranojo de kelkaj eŭropaj registaroj“ kondukas al socia disfalo kaj al perforto, krimigo de migrantoj kaj samtempe al perdo de socia solidareco. Ni postulas respekton antaŭ la gemigrantoj kaj tujan agnoskon de iliaj civilaj, sociaj kaj politikaj rajtoj kaj la fermon de ĉiuj haltigaj koncentrejoj.

Ni postulas respektadon de la ekonomiaj, sociaj kaj kulturaj homrajtoj kaj respektadon de la identeco kaj rajtoj de la indiĝenaj popoloj, same kiel la rajton de la virinoj kaj de la junularo pri socia integriĝo, kiu en niaj regionoj estas tiel ofte lezata kun konsento de la registaroj. Ni esprimas nin por justico, kiu engaĝiĝas kontraŭ senpuneco ĉe deliktoj kontraŭ homaj bazaj rajtoj.

Ni kondamnas la etnocidon kaj armeigon de la teritorioj de indiĝenaj kaj afrikdevenaj popoloj kaj komunumoj kaj postulas la agnoskon de ties rajto je memdetermino, ĉar nur la respekto al ilia aŭtonomeco kaj iliaj kulturoj garantias ke la planedo povu estonte utiligi la trezorojn kies gardantoj ili estas.

Krome ni engaĝas nin por senarmeigo de la luktado kontraŭ fidrogoj, kiu estas ofte uzata kiel preteksto por subpremi popolajn movadojn, kaj ni agas por laŭleĝigo de konsumado de la kokafolio kaj de ties derivaĵoj por doma uzado.

Ni akuzas kaj kondamnas la pozicion de la Eŭropa Unio en la kazo de Kubo, kiu metas sin en la servon de la agresa politiko de Usono. Ni kondamnas eksteriteriajn leĝojn kiel tiun de Helms-Burton kaj postulas la agnoskon kaj respektadon de la rajto je libera determino de la Kuba popolo ĉe konstruado de sia propra politika, ekonomia kaj socia modelo.

Ni esprimas nin kontraŭ la privatigo de komunikado kaj informado kaj, male, por ties demokratiigo. Ni bezonas proprajn kaj solidarajn komunikilojn, kiuj kontribuas al plia konstruado de la civila socio kaj garantias la plurecon kaj plurismon de la komunikila medio. En tiu senco ni salutas la fondon kaj solidigon de Telesur. Krome ni esprimas nin por fino de la perfort-mandato de la UN en Haitio, kiu kontribuas nur al pli forta armeigo de la regiono anstataŭ al ties disvolvado. Por Kolombio ni postulas politikan solvon de la armita interna konflikto kaj pacon kun socia justeco. Ni kondamnas la senpunecon kaj la plej lastatempajn jurajn normojn pri malmobilizado de la kvazaŭarmeanoj, kiuj aldone favoras la senpunecon, kiel ekzemple la malprave tiel nomata „leĝo por justeco kaj paco“. Ni postulas de la kolombia registaro la plenumadon de la Konsiloj de la Unuiĝintaj Nacioj kaj la respektadon de la rajtoj de la viktimoj pri vero, justo kaj kompenso. Ni postulas - kaj laboras por ili - la pacon, la senarmeigon de la internaciaj rilatoj, la senarmigon, la dissolvon de la militbazoj kaj la revenon de la sekurecofortoj en siajn devenlandojn. Ni rifuzas la armeigon kaj la milit-industrian komplekson, kiuj vivtenas la novliberalismon.

Ni, kiel sociaj movadoj de Latinameriko, Karibio kaj Eŭropa Unio, ŝatus refoje kaj insiste akcenti nian volon, ĉe ĉiuj komunaj bataloj kontraŭ fleksebligon de la labormerkato, por digna kaj altkvalita laboro, por civitana kontrolado de la transnaciaj entreprenoj, kontraŭ la novliberala politiko de la registaroj, por defendo kaj profundigo de la sociaj atingoj, por reŝtatigo de niaj naturaj resursoj kaj rezervoj kaj de la nun privatigitaj publikaj servoj, fortigi la kunlaboradon, kunordigadon kaj solidarecon.

Kontraŭ la realigata praktiko de la novliberala praktiko montriĝas hodiaŭ en Latinameriko konkretaj ekzemploj de la volo je rilatoj, kiuj baziĝas sur integriĝo kaj ellaborado de alternativoj. Malfermiĝas nova etapo de suverenaj iniciatoj, kiuj evoluas surbaze de kunlaborado kaj solidareco. Ekzemplo de tio estas la iniciato de bolivara integriĝo ALBA kun sia ideo de komercaj kontraktoj de popoloj, kiuj estas antaŭenigataj antaŭ ĉio de la registaroj de Kubo kaj Venezŭelo kaj al kiu aliĝis antaŭnelonge ankaŭ Bolivio. La sociaj movadoj de Latinameriko, Karibio kaj Eŭropo konsideras aprobe tiujn klopodojn kaj devigas sin - konservante sian sendependecon kaj identecon kiel popolmovadoj -, subteni pozitivan evoluon de tiuj iniciatoj. Ni esprimas ankaŭ nian fidon en la disvolvado de vera politika dialogo kun tiuj registaroj, kiu antaŭenigas malfermitan kaj konsekvencan interŝanĝon.

Tiu nova impeto esprimiĝas en forta aktiveco kaj mobiliziĝo de la sociaj movadoj de Eŭropo kaj Latinameriko kaj en naskiĝo de transformaj registaroj kiel tiu de Venezŭelo kaj de Evo Morales en Bolivio kaj de aliaj registaroj, kiuj en Latinameriko distanciĝas de la liberkomerca politiko. Ni fidas en tio, ke tio kontribuos al fortigo de tiuj tendencoj, kiuj volas ĉesigi la nunan novliberalan politikon kaj iri la vojon al nova integrad-procezo.

La plej granda sukceso de „Enlazando Alternativas 2“ estas ke ĝi evidentigis la harmonion kaj kuntenon de niaj analizoj kaj de niaj agadoj kontraŭ la novliberala politiko kun la registaroj kiuj subtenas ilin. Ni, gehomoj de la sociaj movadoj kaj organizoj de Eŭropo, Latinameriko kaj Karibio devigas nin, plue labori iniciate ĉe la tasko komune krei la kondiĉojn por pli justa kaj pli solidara mondo.

- Ni diras NE al la traktatoj de liberkomerco de la Eŭropa Unio kun Latinameriko kaj Karibio. Ne al la eŭropa „ALCA“ kaj al starigo de miltaj kaj sekurecaj klaŭzoj por la interesoj de la kapitalo.

- Ne al profundigo de la liberkomerc-traktatoj kun Meksikio kaj Ĉilio kaj al elleborado de liberkomerc-traktatoj kun Centrameriko, kun la Anda regiono kaj kun la Merkosur.

- Jes por nuligo de la ekstera ŝuldo de la regnoj de Latinameriko kaj Karibio al landoj de la Eŭropa Unio kaj jes por agnosko de la akumulita historia ŝuldo. Ni ŝuldas nenion, ni pagos nenion ! Ni ne estas ŝuldantoj, ni estas kreditoroj !

- Ne al tiu eŭropa konstitucio, al la Bolkestejn-direktivo kaj al privatigo de la publikaj servoj en la Eŭropa Unio.

- Jes por plifortigo de unueco kaj de duregiona kunteniĝo de la sociaj movadoj de la du kontinentoj survoje al alia ebla mondo, justa, ekvilibriga, kontraŭpatriarkeca kaj paca mondo.

*Elgermanigita de Monda Asembleo Socia (MAS) http://maseo.org/ -vl*

## Multaj registaroj ne aŭskultas la voĉojn de la popoloj pri la ŝuldo

**de Aldolfo PÉREZ ESQUIVEL**

*Intervjuo al la Nobel-premiito pri paco, Adolfo Pérez Esquivel*

Konversacii kun la argentinano Adolfo Pérez Esquivel, signifas eniri en diskutadon pri la sovaĝa kapitalismo, pri la novliberalismo kaj ĉiuj ties sekvoj, kaj aprezi kiom la optimismo karakterizas lian vizion pri la estonto de niaj popoloj. Mi petis tiun intervjuon kun la elstara latinamerika intelektulo, dum unu el la debato pri la ŝuldo, en la kadro de Jubileo Sur, altenativa forumo kiu havas sian duan asembleon en Kubo, kvin jarojn post sia konstituciiĝo en la jaro 2000 en Sud-Afriko.

**Kiun momenton de tiu debato ni trairas ?**

Ni laboras jam dum 20 jaroj pri la temo de la ekstera ŝuldo aŭ la eterna ŝuldo, kaj estas tre grave pritaksi la proceson kiun ni spertas nun kiel ĝia konsekvenco.

La mondo ŝanĝiĝis. Estas granda transfoma dinamiko, sed la meĥanismoj de dominado fariĝas pli intensaj, ne nur en la kazo de ĝirado de la ekonomiaj rimedoj, sed ankaŭ de la interezoj, kaj en tiu matematika rilato de la tri P : Pli ni pagas, Pli ni ŝuldas, kaj Pli mankas al ni.

La tutmondigo estas ĉiutage pli totala, kaj estas realo ke la riĉa mondo alproprigas al si la rimedojn kiuj apartenas al la popoloj, en pocezo kiu rilatas al la ŝuldo.

**Ĉu ekzistas reala konscio pri tiu temo ?**

Estas avanco en la konscio de la popoloj, sed ne en la konscio de la plej multaj registaroj, kiuj estas ankoraŭ komplete kondiĉitaj. Mi ne scias ĉu la povo obeemigis ilin, sed mi ne vidas, ekzemple, en Latinameriko, ke ili agas por alfronti entute la problemon. Tio klare videblas okaze de la Traktatoj pri Liberkomerco, kiun registaroj de diversaj landoj faras kun Usono, duflanke.

Ili faras ankaŭ akordojn pri la ŝuldo, duflanke, kun la Internacia Monfonduso (IMF) kaj la grandaj centroj de la potenco. Estas multaj, kiuj ne aŭskultas la voĉojn de la popoloj, bedaŭrinde. Ekzemple oni vidis tion kiam, post la denunco de la ŝuldotemo, komencis la tuta proceso de privatigoj, trudita de la IMF kaj la Monda Banko.
Ĉio ĉi kaŭzis la perdon de la rimedoj de niaj popoloj, kiuj transiris en la manojn de la transnaciaj organizoj.

**Kion vi opinias pri la plano de Anthony Blair nuligi la ŝuldojn por kelkaj landoj ?**

Tio malĝustas. Tio ne solvas la centran problemon. Temas pri paliativo por kredigi ke tiuj estas la bonuloj kiuj envere prirabas nin.

La ŝuldo estas perversa meĥanismo, pli politika ol ekonomia, kaj estas klare la manko de politika volo solvi ĝin, kaj ankaŭ la manko de la necesa unueco por alfronti kune la defiojn kiujn ni havas hodiaŭ.

Tio generis pli da malriĉeco, pli da socia ekskludo, kaj la konfliktojn kiujn ni spertas en la mondo.

Ankaŭ ekzistas alia problemo kiun oni diskutas ĉi tie, temas pri la ekologia ŝuldo. Temas pri la prirabado kiun la riĉa mondo kaj la Monda Organizo pri Komerco (MOK) trudas al la malriĉaj nacioj alproprigante al si la sciojn de la popoloj pere de patentoj.

Hodiaŭ la malriĉa mondo devas pagi al transnaciaj entreprenoj la kontrolon de nutraĵoj kiel rizo, maizo aŭ sojo. Hodiaŭ ni estas perdantaj la nutraĵan suverenecon, kaj tio estas gravega afero kaj havas rilaton kun ĉiuj trudadoj de dominado kiuj devenas ĉefe de la ŝuldo.

Intervjuis **Elson CONCEPCIÓN P.**

*La intervjuo aperis en « Granma », 28-a de septembro 2005.*
*Traduko por Monda Asembleo Socia (MAS) de Maria Julia Cárdenas Cápiro*

## Cionismo, la palestinanoj kaj la dunacia ŝtato

*Komento pri nova opinisondaĵo*

**de Michael PRÖBSTING**

En sia eldono de la 2-a de oktobro [2004], la brita semajna gazeto The Economist publikigis la rezultojn de opiniosondo inter palestinanoj pri la dezirata ŝtato-formo. La sondadon plenumis la "Jerusalem Media & Communication Center" (1) kaj aperis unue en la israela ĵurnalo Haarec. Antaŭ ol ni koncize prezentos la rezultojn de ĉi tiu opiniosondo, estu rimarkite, ke Haarec estas liberala cionisma ĵurnalo kaj la Economist estas la parolilo de la brita burĝaro, kiu sen rezervoj subtenas la "militon kontraŭ la teroro" kaj la cionisman ŝtaton. Mallonge dirite, la rezultoj estas tiom absolute kredindaj, kiom ilin agnoskas eĉ konvinkitaj adeptoj de la cionismo kaj imperiismo. Plej da apogo inter la palestinanoj (44,5% de la demanditoj) trovas laŭ ĉi tiu opiniosondo la duŝtata solvo – alivorte, la kreo de palestina ŝtato apud israela ŝtato. Tio estas malmulte surpriza, ĉar ĉi tiun solvon ja propagas la Arafat-gvidantaro kaj preskaux ĉiuj palestinaj partioj, taksantaj ĝin la sola realisma ebleco. Fatah – la plej forta grupiĝo inter la palestinanoj – sed ankaŭ la maldekstraj organizaĵoj kiel la Popola Fronto por la Liberigo de Palestino (PFLP) kaj la Demokratia Popola Fronto por la Liberigo de Palestino (DFLP) – predikas jam de jaroj, ke duŝtata solvo almenaŭ mallongperspektive kaj mezperspektive estas la sola atingebla celo. Eĉ la islama Hamas – la dua plej forta grupiĝo inter la palestinanoj – kiu fakte postulas islaman ŝtaton en la tuta Palestino, akceptas pli kaj pli la duŝtatan solvon almenaŭ kiel provizoran solvon.

Tiun perspektivon multaj palestinanoj ankaŭ tial opinias realisma, ĉar la israela ŝtato ŝajnas superpotenca, kaj ĉar la plej liberalaj fortoj en la israela socio – pli bone direndas : tiuj, kiuj volas doni al la cionisma koloniismo liberalan vizaĝon – ankaŭ pledas por la duŝtata solvo. La cionisma dekstro ne akceptas, kiel konate, eĉ tian palestinan bantustanan ŝtaton, kiel ekzemple la proksima fidato de Ŝaron, Dov Weisglass, antaŭnelonge konfesis sen ĉirkaŭvortoj en intervjuo ĉe Haarec (2).

Sed pli interesa estas la dua plej elektita opcio en la opiniosondo, kiun porparolis 26,5% : pli ol kvarono parolas favore al "dunacia ŝtato en la tuta Palestino, en kiu palestinanoj kaj israelanoj ĝuas egalajn reprezentatecon kaj rajtojn" ! La subtengrado por tiu perspektivo de dunacia ŝtato estas en plej alta grado rimarkinda. Ekzistas fakte neniu signifa grupiĝo ĉu en la palestina socio ĉu en la juda-israela socio, kiu diskonatigas ĉi tiun sloganon. Ili ĉiuj nomas la ideon de dunacia ŝtato utopia kaj malutila.

Tiujn argumentojn prezentas en ĉi tiu lando ankaŭ cionismo-favoraj reformistoj de la tipo de la KPÖ [Komunisma Partio de Aŭstrio] kaj la SJ [Socialisma Junularo] (ĝis grupoj kiel la SLP [Socialisma Maldekstra Partio]) kontraŭ la ArbeiterInnenstandpunkt [Laborista Starpunkto] kaj aliaj kontraŭimperiistoj, kiuj subtenas la perspektivon de dunacia ŝtato. Sed fakte, ni marksismaj revoluciuloj estas centoble pli realismaj ol la pseŭdorealismaj subtenantoj de la duŝtata solvo. Ĉar nur – sur socialisma fundamento kreota – unueca dunacia ŝtato de ĉiuj en Palestino vivantaj araboj kaj judoj povas elimini la ekstreman socian malegalecon kaj la en forpeliteco kaj subpremado de milionoj da palestinanoj radikantan nacian subpremon. Duŝtata solvo, kontraste, kreus malriĉan kaj plene dependan Palestinon apud riĉa kaj potenca Israelo. Tio nur daŭrigus la ekspluatadon kaj nacian subpremon sur ŝanĝita fundamento. Kiel la opiniosondo montras, multe da palestinanoj evidente vidas la aferon tiel – malgraŭ la senĉesa propagando de ilia gvidantaro kontraŭ dunacia ŝtato.

Tiu rezulto estas ankaŭ tiom rimarkinda, kiom la kontraŭnaciaj [evidente temas pri la politika tendenco, kiu nomas sin "kontraŭgermana" en Germanio (GM)], cionismo-favoraj fortoj – kiuj intertempe gajnas influon ĝis ene de la gvidetaĝoj de SJ kaj KPÖ – denuncas la ArbeiterInnenstandpunkt kiel "antisemitan", ĉar ni pledas por la disbato de la cionisma ŝtato Israelo kaj ĝia anstataŭigo per socialisma dunacia ŝtato en la tuta Palestino. Por tiuj amikoj de la – laŭ sia esenco rasisma – ŝtato Israelo, la marksisma kontraŭcionismo povas esti egaligita al "antisemitismo de maldekstre". (Vd. pri tio nian raporton pri la debata interparolo kun la SJ en Red Newsletter 126 ĉe www.arbeiterInnenstandpunkt.net.)

Finfine estu menciita ankoraŭ plia interesa rezulto de ĉi tiu opiniosondo. La plej malmultan subtenon ricevas – ĉe nur 2,3% de la demanditoj – la perspektivo de "islama ŝtato". Ankaŭ pri tiu rezulto la cionismo-favoraj reformistoj seniluziiĝos, ĉar la fabelo pri la "fanatika volo de la palestinanoj peli ĉiujn judojn en la maron" servas al ili por rifuzi ĉiun subtenon al la Intifado.

Por ni marksismaj revoluciuloj, ĉi tiu opiniosondo estas pli pruvo pri tio, ke nia perspektivo de dunacia laborista ŝtato en la tuta Palestino estas slogano, kiu tiom konsideras la objektivajn necesojn, kiom ĝi ekagas ekde la konscio de la palestinaj popolamasoj. Senkonsidere la kalumniojn de la kontraŭnaciuloj kaj de tiuj, kiuj cedas fronte al ilia premado, ni de ArbeiterInnenstandpunkt daŭrigas nian konsekvencan batalon kontraŭ imperiismo kaj cionismo kune kun niaj kamaradoj de la Ligo por la 5-a Internacio.

- Solidareco kun la Intifado ! Por la disbato de la cionisma ŝtato Israelo – Por dunacia laborista ŝtato en la tuta Palestino !

- Por la permanenta revolucio en la Mezoriento !

_________

(1) La tuta opiniosondo legeblas ĉe http://www.jmcc.org/publicpoll/resu....
Por la opiniosondo oni pridemandis 1.200 palestinanojn en junio 2004, kiuj prezentas reprezentan sekcon el la diversaj urboj kaj fuĝinto-tendaroj en Cisjordanio kaj Gazao.

(2) Vidu : http://www.haaretz.com/hasen/spages...

Jen la preciza demando el la opiniosondo (vd. piednoton (1), citita el la menciita retpaĝo) :

Demando 6 : Kelkaj kredas, ke duŝtata formulo estas la favorata solvo por la araba-israela konflikto, dum aliaj kredas, ke la historia Palestino ne povas esti dividita, tiel ke la favorata solvo estas dunacia ŝtato, en la tuta Palestino, en kiu palestinanoj kaj israelanoj ĝuos egalajn reprezentiĝon kaj rajtojn. Kiun el la solvoj vi preferas ?

Entute / Cisjordanio / Gazao
N=1200 / N=760 / N=440
Duŝtata solvo : unu israela, unu palestina 44.5 / 45.7 / 42.5
Dunacia ŝtato en la tuta historia Palestino : 26.5 / 27.4 / 25.0
Unu palestina ŝtato en la tuta Palestino : 11.1 / 8.7 / 15.2
Ne estas solvo : 13.6 / 15.1 / 10.9
Islama ŝtato : 2.3 / 1.1 / 4.5
Ne scias : 1.4 / 1.7 / 0.9
Neniu respondo : 0.6 / 0.3 / 1.0

*El : Red Newsletter 127 Informationsdienst des ArbeiterInnenstandpunkt, 2004-10-11 http://arbeiterinnenstandpunkt.net/... (trad. de Gary Mickle. Ĉe MAS: http://mas-eo.org/article114.html*

## La dua industrio de Ekvadoro

**de Maurice LEMOINE**

*"ESTAS VERA nacia tragedio",* ellasis la kandidato de la maldekstro, s-ro Rafael Correa, kelkajn semajnojn antaŭ ol venki en la prezidant-elekto de la 26-a de novembro 2006. Oni eĉ ne scias, kiom da ekvadoranoj vivas en Ekvadoro ! Dum la lastaj dudek jaroj, proksimume kvar milionoj da ili devis forlasi la landon. [1] Kaj ne senkiale... Preskaŭ 50 % de la loĝantaro vegetas tie en malriĉeco. La vivkondiĉoj estis detruitaj de la dolarigo, decidita en 2000. Tiu, altigante la kostojn de loka produktado, ruinigis la agrokulturon same kiel la industrion.

Al tiu bildo aldoniĝas la ekstera ŝuldo je 18 miliardoj da dolaroj, dum, kiel precizigas s-ro Correa, en lando kiu situas en la kvara rango de produktistoj de petrolo de la regiono, "el kvin bareloj da produktita petrolo, la multnaciaj konzernoj forportas kvar kaj lasas unu al la lando, la plej eta proporcio en tuta Latinameriko". Ĉu miri pri la fakto ke popolaj ribeloj renversis tri prezidantojn en dek jaroj ? Kaj ondo da elmigrintoj elsangigis la landon.

La hemoragio komencis en la 1980-aj jaroj, dum starigo de la novliberala modelo de la prezidanto León Febres Cordero. Ĝis en 2002, 80 % des la forirantoj apartenis al la indiĝenaj kaj kamparanaj sektoroj. Ekde 2003 komencis elmigri, ĉefe al Eŭropo, profesiuloj, inĝenieroj, instruistoj, kuracistoj. Tiuj homoj disponas ankoraŭ pri salajroj. La plej malriĉaj ne. Nu, la riskoplena foriro kostas multe. Ĉiuj enŝuldiĝas. Trafikistoj de homa karno, la coyotes, postulas 4.000 dolarojn en 2000, 8.000 dolarojn en 2003, inter 10.000 kaj 12.000 dolarojn hodiaŭ por organizi la vojaĝegon de Ekvadoro ĝis Usono. [2]

Ekde komenco de 2006, la nova migrad-politiko de Vaŝingtono kaj la gardado de la landlimo konsiderinde altigis la kostojn. Fronte al tia peto aperis la chulqueros : en la kadro de eksterleĝa financ-sistemo, estas ili kiuj pruntedonas monon. Je 30 aŭ 40 % da interezoj !

La coyotes transportas la kandidatojn al la American way of linve tra la maro, ĝis la ĝangaloj de Centrameriko, de kie ili kaŝe trairos la limon de Meksikio, poste, se ĉio iras bone, tiun de Usono. La transiro al Eŭropo, malpli danĝera kaj malpli kosta, bezonas nur falsadon de paperoj kaj dokumentoj.

En Hispanio vivas nun okcent mil ekvadoranoj, de kiuj 64 % havas inter 15 kaj 40 jarojn. [3] Multaj tralaboras tie ege lacigajn tagojn de dek-kvin horojn da laboro por rikolto de fruktoj kaj legomoj. Ĉar ili devas, krom supervivi per mizeraj salajroj kaj sendi monon al la familioj, repagi la chulqueros. Kaj la tragedio neniam malproksimas. *"Mafio*, atestas s-ro Freddy Cabrera, instruisto en la alternativa edukado, en Riobamba. *En la momento de la prunto, ili postulas la dokumentojn de proprieto de la domo, de la tereno. Se vi ne komencas pagi, ili konfiskas. Eĉ pli malbone se vi mortas. La familio troviĝas sur la strato."*

Dudek-kvar elcentoj de la ekvadora loĝantaro ricevas monon - 1,7 miliardojn da dolaroj [4] - el eksterlando. Sed je kia prezo... Disiĝo de la paroj, malstrukturiĝo de la familioj, malplia ĉeesto de viroj, inigo de la plej penigaj laboroj. Perdo de orientiloj, aldonas s-ro Cabrera. *"La homoj, kiuj sukcesis foriri, havas infanojn, kiuj havas nenian konscion pri la valoro de la aĵoj. Ili elspezas la remesas por vestaĵoj, por elektronikaj kiĉaĵoj, por bagatelaĵoj, por io ajn."* Forta konsumado sen produktiva disvolvo. Kio okazos morgaŭ ?

*"La lasta foriranto estingu la lumon"*, legeblas sur muro de la tria plej granda urbo de la lando, Cuenca.

**Maurice LEMOINE.**

___

Vidu ankaŭ la artikolojn de Raphaële Bail : *Por la nikaragŭanoj, la supervivo nomiĝas Kostariko* (http://eo.mondediplo.com/article1171.html) kaj *En Salvadoro, dolaroj ŝanĝas la situacion* (http://eo.mondediplo.com/article1170.html)

_________

[1] La loĝantaro estas taskata je dek-tri milionoj kaj duono da loĝantoj.
[2] El Universo, Kito, 25-a de junio 2006.
[3] El País, Madrido, 13-a de aŭgusto 2006.
[4] Dua plej granda fonto de financaj enspezoj de la lando, post la petrolo (1,9 miliardoj da dolaroj).

## La homaro kiel reflekto de la justeco

**de Nadine GORDIMER**

Se ekzistas rimedo, el evolua vidpunkto, por analizi la gradon de trafeco de la memproklamado de la homaj estaĵoj kiel supera formo de la ekzisto, tiu estas certe la rilatoj inter la homoj kiuj devas esti la fina kriterio por pritaksi tiun antaŭrangecon super la aliaj animalaj specioj.

La animaloj intermortigas sin en sia rivaleco por supervivado, por nutraĵo kaj por sia individua reproduktiĝo disputante pri siaj inoj. La homaj estaĵoj pensas ke ilia evoluo transcendis tiajn difinojn de antaŭdestinita formo de ekzistado ; tamen kun terura escepto : la militdeklaro inter nacioj, aŭ kio estas eĉ pli terura, la internaj militoj. Dum milito, la fakto ke homa estaĵo mortigas alian, estas kondamninda ; almenaŭ ekzistas internaciaj konvencioj kiuj starigas minimuman homrespekton por la militkaptitoj.

Tiu kodo inter kreitaĵoj kiuj konsistigas la superan formon de vivo, la homaj estaĵoj, ŝajnas esti ĉirkaŭirata dum paco aŭ pli ĝuste en tempo de nedeklarita milito. Krome, la rompo flanke de tiuj kiuj proklamas sin mem plej bona modelo de demokratio de la mondo kaj superpotenco, la Unuiĝintaj Ŝtatoj de Ameriko, estas eĉ pli evidenta. Dum ĝi alpropriĝas al si maran bazon en suverena fremda lando kaj dum ĝi uzas ĝin kiel malliberejon por tiuj kiuj, kun diversaj ŝtatanecoj, estis deklaritaj kulpaj de Usono, ĝi transigas per tio, por tiel diri, la senmoralecon trans siaj landlimoj. La usona demokratio faris kaj daŭre faras evidentajn agojn kontraŭ ĉiuspeca praktiko kiu atribuas same al viroj kiel al virinoj la rajton deklari sin supera vivoformo. Tio estas la kazo de la marbazo de Gŭantanamo, de la proceso kaj de la apelacio - ambaŭ ĉe partiaj tribunaloj - kaj de la enprizonigo de la Kvin en malliberejoj de Usono. La fiaj kondiĉoj en kiuj ili tenas ilin estas publike konataj, tiom ke ne necesas memorigi ilin. Tamen, tiom longe kiom tio daŭros kaj oni ne kontestos la validon de la kondamnoj de la Kvin, mi pensas ke oni neniam sufiĉe ripetos al la tuta mondo la hororajn spertojn kiujn la Kvin kaj iliaj foraj familioj travivas ĉiutage, ĉiumonate kaj nun ĉiujare, kaj tio malgraŭ la agado de personoj kiuj ankoraŭ kaj daŭre sin proklamas defendantoj de la justeco kaj de la homaro.

Kial oni limigas aŭ malpermesas al la Kvin la komunikadojn kun siaj advokatoj ? Kial oni rifuzas la vizojn al iliaj edzinoj kaj al iliaj familioj por ke tiuj ne povu viziti ilin ? Kial oni kaŝas la fakton ke ili estas enfermitaj en teruraj kaj malnobligaj kondiĉoj en lando kie la demokratio postulas ke oni devas regigi la justecon ĉie ajn kie oni juĝas ?

Kion do timas Usono ? Ĉu la fakto rekoni siajn erarojn perdigus al ĝi ĝian statuson de monda modelo de demokratio kaj ties pageblan eksportadon en komerco kiu ne allasas konteston ? El cinika vidpunkto oni povus pensi ke la riveladoj de la malhumanaj agoj kiujn ili faris en Irako signifus ke la statuso estas jam perdita kaj ke eble io gajneblus per respektado de demokratia justeco kaj de homrajtoj en la kazo de la Kvin. Nun estas tro malfrue.

Indas substreki ke nur tre malmultaj landoj ne rompis nian statuson de universale akceptita supera vivoformo, la lastan stadion en la evolua ciklo de la specioj. Aŭ oni ankoraŭ aplikas la mortpunon, aŭ la esprimlibereco ne ekzistas, aŭ homoj iras en prizonon sen proceso, aŭ kiam ili estas prezentitaj antaŭ tribunalo, ili restas en prizono en malhumanaj kondiĉoj de mismikseco. Neniu lando estas libera de tio kaj ŝuldas al si kontroli sian propran homan etikon rilate la traktadon de la aliaj homaj estaĵoj.

Tamen, dum la plej potenca nacio de la mondo proklamas la demokration, ĝi vane klopodas pravigi la enprizonigon de la Kvin, kio konsistigas hontan perfidon de la valoroj kiujn ĝi afiŝas, demokratian farson kiu primokas tiun kriterion kiun oni sukcesis, kun la jarcentoj, difini kiel bazan principon de la homaro, kaj sur kiu nutras sin la justeco en ĉiu angulo de la mondo.

**Nadine GORDIMER.**
*(http://mas-eo.org/article97.html)*